5-a Jaro. N-o 225 APERAS  SEMAJNE 24. Januaro 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti	SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e	ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

NOVAN PAŜON ANTAŬEN!

Ni ne blufas — nek haltas: prudente ni antaŭeniras...

Jam de kelka tempo ni liveras ĉiumonate dekdu-paĝan n-on de "S-ulo", anstataŭ la ok-paĝa promesita — kaj por la sama abonprezo. Nu, hodiaŭ ni sciigas kontente al nia Abonantaro, ke de nun dufoje en la monato ni liveros dekdu-paĝan n-on. Kaj ni havas la konvinkon, ke ne pasos multe da tempo ĝis ni povos aperigi "S-ulon" ĉiusemajne kun dekdu-paĝa amplekso.

Ni ja fidas al niaj fervoruloj kaj aktivuloj. Nia decido certe duobligos ilian fervoron. Armite per la hodiaŭa sciigo, instigite de la deziro ricevi ĉiusemajne dekdu-paĝan kajeron da interesa legaĵo, abunde ilustrita, ili certe sukcesos bombardi la Administrejon per novaj abonoj. Ili ataku sur la tuta fronto; ni liveras al ili bonan armilon, la venko estas certa.

Inter la Gek-daro troviĝas kelkdeko da modelaj varbantoj kaj agitantoj; kelkaj eltrovas mirindajn rimedojn por disvastigi "S-ulo"n; ili faras ĉion eblan por pligrandigi la nombron da abonantoj. Ni havas K-dojn, kies entuziasmo restas ĉiam freŝa, neniam rompebla, kies aktiveco kreskas kun ĉiu ero da sukceso. Sed ili estas ankoraŭ tro malmultaj. Ne sufiĉe da K-doj konscias la gravecon de gazeto por iu ajn movado; tro multaj senkuraĝiĝas ĉe la unuaj malfaciloj renkontataj en ilia varbado.

Estas eĉ regionoj, kie "S-ulo" ne antaŭeniras (ne parolante pri "blankaj landoj"). Tie la K-doj devas nepre vekiĝi. Necesas starigi kontakton kun ĉiuj laboristoj, kiuj ekstudis esperanton. Ni devas starigi "S-ulo"n sur plej larĝan bazon en la tutmonda laborista movado. El la finiĝontaj esperantaj kursoj ni varbu ĉiujn, kiuj restis fidelaj ĝis la lasta leciono. Necesas konvinki ilin, ke por perfektiĝi kaj fariĝi spertaj esperantistoj, ili devas regule, daŭre legadi "S-ulo"n. La kursgvidantoj klarigu, ke nur per daŭra legado kaj praktikado de esperanto oni akiras fundan scipovon de la lingvo.

* * *

Se ni vokas al vi, fervoruloj, aktivuloj, pioniroj de la movado, por denove pli intense streĉi viajn fortojn, ni faras tion por potencigi la aparaton, kiu servas al vi kaj al ĉiuj membroj de nia Asocio.

Sen bona kaj multlegata gazeto neniam nia movado estos vere forta; neniam ni akiros influon en la laborista movado, se ni ne sukcesos atingi, ke "S-ulo" povu esti komparinda kun iu ajn nacilingva laborista gazeto. Ĉiuj konsciaj SAT-anoj devas ĉiel klopodi por ke plej baldaŭ ni povu liveri ĉiusemajne dekdu-paĝan kajeron de "S-ulo".

Ni havas la firman konvinkon, ke estas eble, eĉ facile akiri 4000 abonantojn. Sufiĉas, ke ĉiu faru sian devon.

* * *

Kiam "S-ulo" aperis ok-paĝe, okazis ne malofte, ke ni ne povis enmeti ĉiun bonan materialon ricevitan. Pro tio, kelkaj K-doj malkuraĝiĝis kaj ĉesigis sian kunlaboradon. Ni esperas, ke ili rekuraĝiĝos kaj denove provizos nin per bonaj manuskriptoj. Ili aldonu bildojn kaj zorgu, ke ĉiurilate la materialo estu interesa kaj plaĉa.

Ne nur la amplekso de nia gazeto devas kreski, sed ĝia enhavo ja devas fariĝi pli kaj pli valora.

Niaj gvidprincipoj restas jenaj: 1. "S-ulo" estu la malplej kosta gazeto en Esperantio; 2. ĝi estu la plej ampleksa; 3. ĝi estu la plej valora.

Kun la helpo de ĉiuj konsciaj SAT-anoj ne povas esti dubo, ke tiuj niaj principoj pli kaj pli transiros en la praktikon. SENNACIULO.

Noto: *Kun la pliampleksigo de la gazeto ni povos de nun akcepti grupajn fotojn por aperigo en "S-ulo", kondiĉe ke la grupoj mem liveru la kliŝojn aŭ pagu al la administranto la prezon por kliŝigo. En ambaŭ okazoj la kliŝoj restas propraĵo de la grupo kaj la administranto, estas preta, se oni petas, resendi la kliŝon afrankite.*

BAZAJ PRINCIPOJ DE L' MARKSISMO

La tri fundamentaj kolonoj de l' marksismo estas la dialektika metodo, la materialista histori-koncepto kaj la analizo pri la kapitalista ekonomio.

La dialektika metodo estas la esprimo, la ideologia rebrilo de l' reala disvolviĝo en la mondo. Ĝi ne vidas la aferojn tiaj, kiaj ili estas, sed tiaj, kiaj ili fariĝas. Ĝi neniam fiksiĝas al donita punkto sur la linio de l' senĉesa estiĝado, sed ĝi ekkaptas tiun punkton en sia movo, kiel tendenco, kies realigo efektiviĝas en la interpuŝiĝo de l' kontraŭecoj, kiu sinteziĝas en superan unuon. Komprenante ĉiun disvolviĝon kiel senfinan procezon, ĝi konas nek absolutajn verojn, nek fiksajn dogmojn, nek formulojn validajn unu fojon por ĉiam. Ĝi ne povas halti ĉe definitiva konkludo, ĉar la mondo evoluas pluen, novaj kontraŭecoj kreiĝas, naskante per sia interpuŝiĝo novan realon.

La materialista histori-koncepto klarigas la historiajn okazantaĵojn, la socian organizadon, la ideojn kaj la kredojn, la jurajn rilatojn kaj aliajn, de donita epoko, per la maniero kiel la homoj produktas siajn vivrimedojn. Estas nur la scienca aplikado de l' banala vero, ke por havi ideojn, la homoj devas manĝi, konsistigi socion kaj organizi sian kolektivan vivon. Morta homo ne pensas. Ĉe la lumo de ĉi tiu koncepto, la sciencaj, religiaj, politikaj ktp. doktrinoj, la celadoj kaj agoj de la skoloj kaj de la partioj, kiuj kontraŭstaras sin en la socia vivo, aperas lastvice kiel la rebrilo de l' ekonomiaj rilatoj difinantaj la tutan superstrukturon socian kaj ideologian.

La marksista analizo pri la kapitalista ekonomio malkovris, sub la ekstera aspekto de l' politika egaleco kaj de l' valor-interŝanĝo, la ekspluatadon de la homo fare de la homo. Ĝi kondukas la fenomenojn de la surfaco, de la cirkulado, de la borso, de l' merkato, al leĝoj rigoraj, kiuj superregas la aktivecon de ĉiuj produktadaj kaj cirkuladaj fortoj, kia ajn estu la videbla sendependeco de ĉiu unuopa kapitalisto rilate al siaj kolegoj, kia granda ajn estu la libereco de l' dungito elekti la kapitaliston, al kiu li vendas sian laborforton. La ekonomia analizo de Marks malkovras fine la kontraŭdirojn inter la diversaj leĝoj, kies kunludo reguligas la meĥanismon de l' ekspluatado de la laborforto kaj de la realigo de l' plusvaloro. Ĉi tiuj kontraŭdiroj difinas la celadojn klare signitajn direkte al la kreado de nova socia ordo, la komunismo:

Konkurence kun tiu ĉi centraligo, aŭ la elproprigo de multaj kapitalistoj fare de kelkaj, disvolviĝas la koopera formo, en skalo pli kaj pli granda, de l' laborprocezo, la racia apliko de l' scienco al la tekniko, la sistema ekspluatado de l' grundo, la transformado de l' unuopaj produktrimedoj en rimedojn utiligeblajn nur komune, la ekonomiigo de ĉiuj produktrimedoj por ilia utiligo kiel produktrimedoj de socia kombinita laboro, la eniro de ĉiuj popoloj en la retaĵo de l' mondmerkato, kaj konsekvence la internacia karaktero de l' kapitalista reĝimo. Laŭ la mezuro, kiel malpliiĝas la nombro da grandaj kapitalistoj, kiuj alproprigas kaj monopoligas ĉiujn profitojn el ĉi tiu transforma procezo, oni vidas pliiĝi la mizeron, la subpremon, la sklavecon, la degeneradon, la ekspluatadon, sed egalmezure la ribelon de l' laborista klaso, kiu pligrandiĝas senĉese kaj kiu estas spertigita, unuigita, organizita per la meĥanismo mem de l' procezo de kapitalista produktado. La monopolo de l' kapitalo fariĝas la kaptilo por la produktmaniero, kiu disvolviĝis kun ĝi kaj per ĝi. La centraligo de l' produktrimedoj kaj la sociigo de l' laboro atingas punkton, kie ili ne plu akomodiĝas al sia kapitalista envolvaĵo kaj krevigas ĝin. La lasta horo de l' privatkapitalista propraĵo sonis. La elproprigintoj estas elproprigataj siavice[1]."

Ĉi tiuj tri fundamentaj tezoj formas, en sia kuniĝo, la marksismon. Ĉu ili hodiaŭ estas skuitaj tiele, ke oni rajtus paroli pri krizo de l' marksismo? Neniel. La dialektika metodo estas la ĝenerala leĝo de ĉiu evoluo. Nenio ĝin malkonfirmis ĝis nun. La ekonomia determinismo, tiel vive kontraŭbatalata, trabatis al si la vojon, kaj eĉ la burĝaj scienculoj turnas sin pli kaj pli ofte al tiu ĉi metodo por klarigi la historion (ekzemple, Henriko Se, france: Henri Sée). La argumentoj de De Man kaj de Istm'n (angle: Eastman) kontraŭ la materialista histori-koncepto entenas nenion originalan, nenion, kio ne jam estus refutita de Marks, Engels, Plekanov kaj aliaj marksistoj. Rilate al la analizo de l' kapitalista ekonomio, sur kiun koncentrigas sin la atakoj de ĉiuj, kiuj iras "trans la marksismon", ni pruvos aliloke, punkton post punkto, ke la ekonomia doktrino de Karl Marks estas konfirmita per ĉiuj faktoj, ke nenio ĝin malkonfirmas, ke ĉio ĝin plifirmigas.

Sed tio ne signifas, ke la marksismo estas eterna. Se la dialektika metodo, sur kiu ĝi bazas, estas ĝusta, la marksismo devos, ĝi mem, cedi iutage la lokon al supera unuo. La venko de l' socialismo realigos "la salton el la regno de l' neceso en la regnon de l' libero", pri kiu parolis Engels. En socio liberigita de blindaj ekonomiaj leĝoj, kiuj ĝin regas hodiaŭ, la ekonomia determinismo troviĝos ekstervalida. La analizo pri la kapitalista ekonomio, ĝiaj leĝoj kaj ĝiaj tendencoj, estos plue nur studobjekto por arkeologoj. De l' tuta marksismo restos ne pli ol la dialektika metodo, rebrilo de l' movado de la realo en la homa cerbo, kiu nur povas malaperi kun la raso aŭ kun la homa intelekto[1]. La dialektika bazo malhelpas do la marksismon ostiĝi per la ripetado de l' samaj formuloj. La marksismo povas resti ĝi mem nur sub la kondiĉo de konstanta analizado de l' realo, kiu evoluas kaj kiu devigas ĝin evolui siavice. Marksisto povas esti ortodoksa nur sub la kondiĉo, ke li senĉese ree pridiskutas la sendube akiritajn verojn, inkluzive la paroloj de l' majstro.

Marksisto estas herezulo, se li limiĝas je tio ripeti maŝine la frazojn, la konsilojn, la devizojn de Karl Marks, t. e. se li estas ortodoksa en la senco, kiel la Eklezio konceptas tiun ĉi esprimon. Marksisto povas resti ortodoksa nur je la prezo de daŭraj "herezaĵoj". Sed tiu ĉi herezula ortodokso enhavas precize la kondiĉon por konservado de l' marksisma fundamento, de l' dialektika metodo. Forlasu ĉi tiun metodon, kaj vi estos ĉu herezulo, ĉu ortodoksulo en la ordinara, vulgara, religia senco de tiu termino. Konservu la dialektikon: la ortodokso estos herezo, kaj la herezo-ortodokso.

Primus.

[1] K. Marks, La Kapitalo, vol. IV. Eldono Costes, pĝ. 273/274.

[1] Istm'n sendube ne faris tiujn ĉi pripensojn, mokante pri Roza Luksemburg, kiu asertis, ke la marksismo portas en si la ĝermojn de sia propra formalapero.

La Protokolaro de la VIII-a SAT-Kongreso



estas nur 64-paga. Sed la kompostaĵo estas densa, kun multaj mallongigoj; rezultas el tia aranĝo, ke la kajero entenas materialon kapablan plenigi 100 paĝojn. Jes, **100** paĝojn — kaj ĝi

kostas nur 0,50 mk. g.

la ridinde malaltan prez. de

Cetere, eĉ se tiu Protokolaro kostus duoble pli kare, ĉiu SAT-ano devus tamen havigi al si tiun necesan dokumenton. Sekve ĉiu havas duoblan motivon por tuj mendi al

Administrejo de SAT, Colmstr. 1 Leipzig O 27 (Germanio).

LA CERBO DE LENIN

Post la morto de grandaj homoj iliaj cerboj transiras al la dispono de l' sciencaj institucioj. Tiuj lastaj okupas sin pri tio esplori la internan konsiston de l' cerbo. Por tia esplorado ekzemple



21. 1. 1924 — 21. 1. 1929

oni prenis la cerbon de Leo Tolstoj. Por tiu celo oni ankaŭ prenis la cerbon de Lenin. La instituto por esplori la cerbon de V. I. Lenin, organizita en 1924 ĉe l' popolkomisario por sanigo, sufiĉe fruktodone solvas la problemon de granda graveco — doni materian fundamenton al la plej alta nervo-psika agado de l' homo.

La materialistaj metodoj de esplorado la proceson de l' plej alta nervopsika agado komencis praktikiĝi nur en la lastaj jaroj. Tiurilate meritas eksterordinaran atenton la t. n. cito-arĥitektonika metodo, kies reprezentanto estas profesoro Foĥt (germane: Vogt). La esenco de tiu metodo laŭ prof. Foĥt, kiu estis invitita de la soveta registaro por esplorado de l' Lenina cerbo, estas jena:

En la cerbo distingiĝas kaĝoj el grajno kaj kaĝoj piramidecaj. La diferenco inter piramidecaj kaĝoj kaj kaĝoj el grajno konsistas en tio, ke la unuaj estas pli grandaj kaj donas siajn disbranĉaĵojn je grandaj distancoj — ĝis unu metro. La piramidecaj kaĝoj ligiĝas (asociiĝas) kun aliaj kaĝoj kaj servas kiel bazo por pli alta psika vivo kaj agado.

La el la cerbo de Iliĉ pretigitaj preparaĵoj, kompare kun la preparaĵoj faritaj el la cerbo de ordinaraj homoj, montris grandegan diferencon en la strukturo de la cerbo de Lenin kaj tiu de ordinara homo.

La piramidecaj kaĝoj ĉe Iliĉ estas evoluigitaj pli forte, la asociigaj fibroj inter ili estas evoluigitaj pli grande, la kaĝoj el grajno estas ankaŭ multe pli grandaj kaj pli helaj. Tio laŭ klarigo de prof. Foĥt montras, ke la asociiga kapablo ĉe Lenin estis multe pli alta ol ordinare, la spirita vivo havis riĉan materian bazon (la grandan evoluecon de piramidecaj kaĝoj kaj kaĝoj el grajno). La sentoj kaj impresoj ricevataj per la piramidecaj kaĝoj en unu loko, estis korektitaj kaj plibonigitaj en tuta vico da impresoj, ricevitaj de la aliaj kaĝoj kun iliaj kunligantaj markotoj.

Tie ĉi ankaŭ evidentiĝas la fundamentaj trajtoj de la psiko de Lenin: lia genieco, lia kapablo eksterordinare rapide analizadi en komplikaj situacioj kaj problemoj kaj la kapablo al rapida ago.

La esplorado de l' cerbo de Lenin daŭras. La scienco evidente sukcesos per la materialista metodo malfermi



Profesoro O. Foĥt
la plej eminenta reprezentanto de nova esplorbranĉo, la cerb-esplorado

multon, kio al ni ne estis konata en la sfero de l' procezo de la plej alta nervopsika agado. La interesa laboro komencita de Foĥt kaj liaj lernantoj estas daŭrigata.

S. Kudrjavicki (10262).

BIBLIOTEKO DE SENNACIULO

N-o 7

La Vojo al Scienco de Estonto

de Akadem. *Fersman*

Kun speciala antaŭparolo de l' aŭtoro por la esperanta eldono. — Tre interesa popularscienca verketo, tute aktuala, montranta larĝajn perspektivojn en la estonton. — Ĝin ĉiu K-do legos kun granda ĝojo.

Prezo: 0,60 mk. g.

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig 0 27

LA NEGRA PROBLEMO EN AMERIKO

La negro, "tiu ĉi kampulo de ĉie kaj ĉiam", kiel esprimas sin F. L. Ŝöl (germ.: Schoell) en studo pri la "negra renesanco" en Usono, estas dum la lastaj jaroj transĵetita el la patriarka mezepoko en plenan industrian dudekan jarcenton, kaj troviĝas nuntempe en plena periodo de adaptiĝo.

La enurbiĝo de l' negroj estas fakto: la migrado de l' kamparanoj kaj farmistoj negraj al la urboj de l' nordo plifortiĝis post la milito, tiagrade ke Nov-Jorko nombras nuntempe 200 000 nigrajn loĝantojn kaj ke ses urboj — Baltimoro, Ĉikago, Nov-Orleano, Nov-Jorko, Filadelfio kaj Vaŝingtono sume nombras preskaŭ milionon da negroj. Harlem, unu el la multnombraj holandanaj urbetoj kreitaj origine ambaŭflanke de l' Höds'n (angle: Hudson)-enfluo, fariĝis dum ĉi tiuj tridek lastaj jaroj vera amerika ĉefurbo de l' nigra raso. Konsistiĝis malrapide, en tiuj ĉi grandaj centroj, speco de negra mezklaso. La negroj de Harlem posedas preskaŭ la tutan bienaron, ĉiujn domojn, ĉion netransporteblan de sia ĉefurbo. Negraj familioj havas prosperajn entreprenojn, precipe interhelpajn kaj asekurajn; ekzistas negra gazetaro, kiu nombras 500 semajnajn ĵurnalojn por tuta Usono kaj kiu ekflamigas la negran fieron, la afrikan grandon de la raso. Ĉiu individua sukceso akirita de negro en la mondo estas senpere kreditigata al la tuta raso. Ekzistas flanke de l' negra arto, kiun la blankuloj larĝe kunhelpis modigi, negro-amerika literaturo, en kiu evidentiĝas, ke eble kiel poetoj la usonaj negroj estas la plej dotitaj. Kiel plilarĝigo de tio, kion Ŝöl nomas la "horizonto de l' negroj", ekzistas la altiriĝeco de Afriko, tia malproksima voko de l' lango kaj de la raso. Ekzistas negra naciismo — bazita ne tiom sur la historia kaj tradicia komuneco, sur pasinto de sklaveco kaj estanto de humiligoj — kiu kreiĝas kaj evoluas.

Kiun solvon oni vidas por tiu ĉi problemo de l' amerikana vidpunkto? La verkinto notas, ke la miksiĝo de l' rasoj forigos eble iun tagon "la kolor-barieron", sed necesos longaj jaroj. Li notas, ke jam ekzistas du milionoj da duonnegroj en Usono, ke apenaŭ ekzistis antaŭe ŝtatoj tute blankaj, dum nune ne ekzistas plu eĉ unu sola.

La ironio estas la ĝojo en la saĝo. Ĝi estus tro malhela sen tia fulmeto; ĉar fundamente la saĝo estas akra k malgaja, k entenas ian abnegacion kaj rezignacion.

ANATOL FRANS

Kamparlaborista mizero en Bavario

La germana kamparlaborista unuiĝo profesia nuligis por tuta vico da distriktoj de la germana regno la tarifojn (intertraktatojn). Se tiuj ankaŭ ne tuŝas la ekstergermaniajn laborulojn, mi tamen opinias, ke la sekvantaj linioj eble estas interesaj por multaj sennaciecaj K-doj.

Kiel parlamentano Hörnle antaŭ kelkaj semajnoj pruvis per sia parolado en la germana parlamento, la kamparlaboristo estas duona sklavo de sia entreprenanto. Ne nur li, sed ankaŭ lia familio, de la plej juna infano ĝis la edzino, estas servigitaj al la mastro. Kuraĝante postuli sian tarife fiksitan rajton, plej ofte la kamparlaboristo riskas ne nur maldungon, sed eĉ eligon el la loĝejo, kiu en plej multaj okazoj apartenas al la mastro, ĉe tiu li laboras. Ne estas diferenco, ĉu temas pri princo aŭ grandbienulo de la Bavara Popolpartio (eklezia) aŭ pri gvidanto de la Bavara agrikultur-posedanta partio; ili ĉiuj estas samaj rilate al siaj dungitoj. La reprezentantoj de tiuj ĉi "sinjoroj" efektivigis kun la kamparlaborista unuiĝo en Supra Bavario intertraktaton, kiu fakte estas la tarifjura fiksado de la sklavigo al kamparlaboruloj. Unue estas decidita pri la labortempo, ke ĝi "regule" estu:

Ekde	1. 11. 28	ĝis	28. 2. 29	8	horoj
„	1. 3. 29	„	15. 5. 29	10	„
„	16. 5. 29	„	15. 9. 29	11	„
„	16. 9. 29	„	31. 10. 29	10	„

Sed tiu ĉi meznombra dekhora "normallabortempo" ne sufiĉas; la 2-a paragrafo decidas la plenumon de kromhoroj "laŭ la bontrovo de la labordonanto". La nombro de la kromhoroj tute ne estas difinita, do, ĝi estas tute laŭvola. La kamparlaboristoj, okupitaj pri stallaboroj, krome estas devigataj plenumi "necesajn laborojn en la stalo" ankaŭ dum dimanĉoj kaj festotagoj sen speciala pago. Praktike do rezultas el tio, ke stallaboristoj dum la tuta jaro eĉ ne ĝuas unu solan liberan dimanĉon kaj ne ricevas eĉ ian pagon por tiu festtaga laboro, se tio plaĉas al la mastro. Tiele la grandbienuloj en Bavario (la plej nigra eklezia parto de Germanio) observas la dimanĉon.

Kio validas por la stallaboristo, iagrade ankaŭ validas por la melkistoj. Ĉi lastaj simple rajtas postuli "12 liberajn tagojn dum jaro", t. e. ĉiumonate unu tagon, kiun cetere la mastro povas doni dum la semajno. Libertempo por ĉiuj laŭ tarifo dungitaj kamparlaboristoj post unujara okupiĝo ĉe sama mastro estas 2-taga. Tio estas la kondiĉoj, sub kiuj pasas antaŭ niaj okuloj la tragedio de bavara kamparlaboristo. Por tiu ĉi dumviva sklaveco la kamparlaboristo en nia demokrata respubliko ricevas salajron, kiu apenaŭ sufiĉas por nutri la familion ĉiutage per terpomoj kaj faruno. La plej bone pagata kamparlaboristo en Supra Bavario en loka klaso A ĉe 8-hora labortempo ricevas kontanta mk. g. 2.48 kaj ĉe 11-hora labortempo mk. 4.41. Tiuj ĉi salajroj validas por semajntaga kaj por dimanĉa laboro. En la plej malalta ŝtupo kamparlaboristo 20-jara kaj pli aĝa ricevas ĉe 8-hora labortempo mk. 2.18 kaj ĉe 11-hora labortempo mk. 3.—; 15—16-jara nur perlaboras potage mk. 1.10 ĝis 1.51. Pli mizera eĉ estas la stato de la laboristinoj, kiuj, kvankam ili laboregas sammulte kiel la viroj, tamen malplimulte perlaboras. 20-jaraj kaj pli aĝaj virinoj ricevas en la loka klaso A mk. 1.86 ĝis mk. 2.56; 15—16-jaraj ricevas mk. 0.82 ĝis mk. 1.13. Pro tiel mizeraj salajroj estas tute kompreneble, ke la kamparlaboristaro ĉiamaniere provas, ŝanĝi sian laboron kun la industria laboro. La salajroj de la melkistoj ja estas iom pli altaj, sed ili atingas posemajne plejbonŝance nur mk. 20.07 ĝis mk. 24.96. Melkistinoj en la plej malalta loka klaso eĉ nur ricevas mk. 15.07 posemajne.

Kun tiuj ĉi mizeregaj salajroj krome estas donataj tielnomataj "Deputatoj" (pago per naturproduktoj, do, terpomoj, lakto kaj faruno ktp.), kiuj kompreneble tute ne sufiĉas por tuta kamparlaborista familio. Por kamparlaboristoj, ne loĝantaj en mastra loĝejo, krome estas pagata loĝejaaldono, kiu atingas sian plejan altecon en la suprabavariaj banlokoj per mk. 14.00 pomonate. Krom tio la "tarifo" ankoraŭ enhavas la paragrafon, ke laŭkvante pagata laboro ne povas esti malakceptata principe.

Tio ĝenerale estas la kondiĉoj, sub kiuj la bavara kamparlaboristaro vivas. Oni certe devas konsenti, ke bonnutrita sklavo de la antikva roma imperio laŭcirkonstance posedis pli da libereco, ol la kamparlaboristo en la plej bona el ĉiuj respublikoj (?).

Laŭ *Neue Zeitung* (Nova Gazeto)
esperantigis Milok Centdek.

La nuntempa tajlor-metio en Anglio

Antaŭ jaroj tajloro estis persono, kiu preninte iom da ŝtofo scipovis fabriki el ĝi kompletan vestaĵon — laŭ angla diro "de krajondesegno ĝis la butontruoj". Sed ne estas tiel nuntempe. Hodiaŭ la tajlorado estas nur parto de la fabrik-procedo.

Antaŭ kelkaj jaroj, por malpliigi la laborkostojn, oni en Lids (angle: Leeds) elpensis la "dvid (angle: dwid)-sistemon" de vest-fabrikado, kaj pro tiu fakto Lids nuntempe estas la ĉefa vestfabrikejo de Anglio. Pro ĉi tiu "kvazaŭ-Ford"-a sistemo de fabrikado estas necesa preskaŭ cento da diversaj metiistoj por fari la tri vestaĵojn: jako, veŝto kaj pantalono.

La fabrik-maniero estas jena: La ŝtofo komence estas desegnata kaj poste pasas al la eltranĉisto, kiu post sia prilaboro pasigas ĝin al la subŝtofa tranĉisto. Post tio la tri vestaĵoj disigite estas sendataj al siaj propraj fabrikoj. La jako dividiĝas inter la faristoj de la manikoj, poŝoj, subŝtofo, butontruoj, kolumoj ktp. Post kiam ĉiuj finis sian laboron, la kunigisto kunigas ĉiujn partojn, kaj jen — la aĵo estas preskaŭ preta. La butonoj alkudriĝas maŝine, kaj per maŝin-vaporpremilo oni ordigas la tutan ĵaketon. La veŝto kaj pantalono samtempe kaj samprocede estas prilaboritaj, kaj post unu horo la tuta kompleta vestaĵo estas finpretigita. Estas firmo en Lids, kiu havas kvinmilon da gelaboristoj — plej multe virinoj. Kaj vizitantoj ofte estas trakondukataj tra la fabriko. La firmo ĉiam donacas veston al unu el la vizitantoj. Oni mezuras la vestricevonton, kaj tiu, travaginte la fabrikon, ricevas la pretan vestaĵon en la oficejo.

La dividsistemo havas, laŭ la laborista vidpunkto, malbonajn flankojn. Unue, la sola spertulo estas la tajloro, kies nura laboro estas bone formi la kolumon. Aliaj labor-partoj estas farataj de ĵus lernejon forlasintaj junuloj, ĉar la farotaĵo estas tiom dividita, ke sensperta infano, post kelkaj minutoj, scias fari ĝin. Pro tio, kvankam en Lids troviĝas pli ol kvindek mil "tajlormetiistoj", ne estas unu el cent, kiu estas vera "tajloro". La aliaj estas nur partfaristoj kaj maŝinzorgistoj. Kompreneble, sub tiuj kondiĉoj la salajroj ne estas altaj, plej ofte oni pagas laŭpece; sed dum la somera sezono, kiam ni estas plej okupataj, la salajroj estas sufiĉe kontentigaj. Dum la vintro — de oktobro ĝis marto — male oni laboras nur dek ĝis dudek horojn ĉiusemajne.

Alia malbona flanko estas, ke neniu havas ŝancon lerni metion. Oni nur lernas parton de metio. Kaj ĉar tial oni malfacile trovus novan laborejon, la mastroj ĉiam minacas maldungi tiun, kiu agas kontraŭ la interesoj de la firmo.

Unu bona flanko ekzistas en tiu ĉi sistemo. Komplika maŝinaro povas esti facile malfunkciigata, kaj strikante oni malfunkciigas la sistemon. Sed lastatempe la mastroj enkondukas novajn maŝinojn, kiuj kompreneble faras pli da laboro. Dume la vestaĵfaristoj daŭras porti sur siaj korpoj ĉifonojn.

L. B. (8048), Lids.

★ DIVERSAĴOJ ★

Kresko de l' ŝtata buĝeto

En Sovetio, malgraŭ objektivaj malfavoroj (blokado, malbonigo) la ŝtata buĝeto en 1926/27 havis kiel rezervon 100 milionojn da rubloj; restis neelspezitaj 52 milionoj; la enspeza parto donis pluson da 230 milionoj, kompare kun pasinta jaro kresko je 33%. — La kresko kontraŭ la pasinta jaro en buĝeto de 1927/28 estas 1 268 000 000 rbl.; ¾ de la sumo estas elspezitaj por popola mastrumado, el tio sekvas malkresko de senlaboreco, plibonigado de l' vivo. Por industriigo en la buĝeto por 1928/29 estas fiksitaj 1659 milionoj da rubloj. (3409)

Interesa eltrovo

En suda Siberio, inter la riveroj Ĉitaligac kaj Kandos, oni eltrovis naŭ vilaĝojn kaj ses vilaĝetojn, kies ekzisto estis tute nekonata. La loĝantaro konsistas el malnovaj kreduloj, kiuj parolas duonslavan, duontataran lingvon kaj okupas sin pri ĉaso kaj agrikulturo. Ilia vivmaniero estas iom simila je tiu, kiu ekzistis en Rusio dum la deksepa jarcento. Ili ne havis la plej malgrandan ideon pri la ekzisto de l' soveta potenco nek, cetere, pri la ŝanĝiĝoj okazintaj en Rusio depost la 18-a jarcento. La Scienca Akademio sendas specialan delegitaron por studi tiujn ĉi strangajn homojn, kiuj vivas kun malfruo de tri jarcentoj.

Homoj kun vostoj

En Londono antaŭ nelonge aperis libro "La neeltrovita Aŭstralio", en kiu ĝia aŭtoro, Hubert Vilkins, la konata esploristo en arktaj landoj, priskribis interalie genton, kiu per sia vivmaniero apartenas al la ŝtona epoko kaj distingiĝas per tio, ke la homoj havas vostojn. Li vidis ilin sur la insulo Milingibi, plej ofte ĉe grupo de Krokodilaj insuloj, kaj skribas jenon:

"Tiuj homoj havas neniun vestaĵon, kaj ĉe la plimulto e! ili oni povas rimarki interesan fiziologian distingaĵon. La lastaj du aŭ tri ringoj de l' spino elstaras en formo de malgranda vosto. Ĝi ne estas tiom rimarkebla kiel ĉe kelkaj afrikaj gentoj, sed tiom longa, ke ĝi estas videbla sur fotografaĵo."

Vilkins skribas ankaŭ, ke la sovaĝuloj konfesis al li, ke ili estas kanibaloj, sed estas gvidataj per difinitaj reguloj, kiu kiun povas manĝi. "Nur la junuloj — ili diris — rajtas manĝi malgrandajn infanojn. La korpon de l' junaj knabinoj rajtas manĝi nur maljunuloj. Al virinoj estas malpermesite manĝi ne-plenaĝajn knabojn, sed ĉiuj povas manĝi plenaĝajn virojn kaj virinojn." S. K. (10 262).

Pri la situacio de rusaj virinoj en Hungario

Dum la mondmilito la hungaraj militkaptitoj edziĝis en Rusio kun rusaj knabinoj laŭ rusaj leĝoj. Post la milito la militkaptitoj hejmen venis kune kun siaj edzinoj. Alveninte Hungarion, tre multaj inter ili tuj ĉe la stacidomo forlasis la edzinojn. Imagu al vi la situacion de tiuj malfeliĉaj virinoj. Mi ĝuste tiam estis ĉe la orienta stacidomo de Budapeŝto, kiam alvenis vagonaro kun el Rusio revenintaj estintaj militkaptitoj. Inter ili estis 13 rusaj virinoj; mi proksimiĝis kaj alparolis ilin, demandante, kiu novaĵo estas en Rusio? Post kelkaj minutoj la edzoj diris al siaj edzinoj, ke ili devas iri al la polico por peti pasporton kaj per ĝi daŭrigi veturon al siaj vilaĝoj. La edzinoj konsentinte restis kaj atendis ilin. Sed pasis 3—4 horoj kaj la edzoj ne revenis. Nur 4 honestaj viroj revenis, kaj la aliaj 9 virinoj restis tie plorante kaj malesperiĝinte. Kiam mi vidis, ke la edzojn jam vane ili atendas, mi vokis policiston kaj petis lin pri helpo. La policisto forkondukis ilin al la polictransportejo. Tio estas arestejo, kie la punitoj de la polico, ĉu politikaj, ĉu ŝtelistoj, ĉu prostituitoj, ĉu devige hejmen transportitaj estas kunamasigitaj. Tie oni devas labori por peco da pano kaj iom da supo dum la tuta tago.

Sed, krom ĉi tiuj, centoj da rusaj virinoj vagadas en Hungario, precipe en Budapeŝto, kiel la senmastraj hundoj, priridataj kune kun la rusaj leĝoj, kiuj en Hungario ne estas validaj.

Se tamen estas inter la viroj honestuloj, kiuj volas vivi kun la rusa virino, la vilaĝa pastro kaj notario ofte devigas ilin forlasi la rusan edzinon. Vere estas kompatindaj tiuj virinoj kaj infanoj. Necesus ion fari kontraŭ tiu senhoma agado. Necesus averti la virinojn, ke ili ne iru kun siaj edzoj en Hungarion, ĉar la plej granda mizero atendas ilin tie. Kaj kiuj volas reiri, por tiuj necesus plifaciligi la reiron. Se la virinoj estas belaj, ili povas iom vivi, kaj la infanoj? ...ili estas tute perditaj por la socialista ideo, ĉar ili vivas en zorgatejo, kie ili estas edukataj laŭ religio kaj faŝista ideo.

Eĉ la hejmen venintaj estintaj militkaptitoj devas kelkajn semajnojn resti en la tielnomata "esplora tendaro": oni esploras, ĉu ili ne ludis ian rolon en Rusio. Se iu estas denuncata, li estos punata, aŭ li devas promesi, ke neniam plu li partoprenos en socialista movado; ĉiusemajne li devas sin anonci, je la 21-a horo esti hejme; skribi leteron, viziti kunvenojn ne estas permesate. Ĉi tio koncernas ankaŭ la ĉi tie restantajn rusojn. Unuvorte, la situacio estas neeltenebla, estas granda la sopiro reen iri en Sovetion. Oni devas helpi; mi jam skribis ruse al Sovetiaj gazetoj; vane. Nun mi petas la Sovetiajn SAT-anojn, ke kiel eble plej ili faru sian devon, savu, kio estas ankoraŭ savebla, dum ne estas tro malfrue.

Laŭ la peto de K-do 13 352. —

B. Szerénii (5418).

Por ekkoni kaj kompreni ĝuste la opiniojn de homoj, oni devas prefere observi, kion ili faras ol aŭskulti, kion ili diras. Dekart.

★

HODIAŬ EN BULGARIO

Ho, jes, la ŝtatoficistoj en ĉi tiu lando povas lukse vivi; ili ja estas riĉaj pro la altaj salajroj gapataj al ili. Unu el niaj amikoj, 24-jara plenforta viro, donas sian tutan tempon, energion kaj lertecon por ricevi la princan sumon de 1500 levoj (proks. 56 sv. fr.) monate. Tiu sumo devas sufiĉi por lupago, manĝoj, decaj vestoj ktp. Kaj bona kompleta vestaĵo kostas 3000 levojn (proks. 112 sv. fr.), kiun li kredite aĉetas kaj pagas poparte monate ĝis plena elpago. Kiam la kompleto fariĝas nefreŝa, li pagas al tajloro por turni la ŝtofon, por aspekti nete vestita. Estas klare, laŭ lia buĝeto, ke li neniam rajtas aspiri kaj esperi esti edzo, ĉar estus krimo peti fraŭlinon edziniĝi kun li kaj peni vivi per tia malsatiga salajro. Li estas unu el la sklavoj de la ŝtato. Dum la tertremo en la centro de la lando la domo, en kiu nia amiko kun gepatroj loĝas, difektiĝis, kaj la domaĝo sumiĝis je 15 000 levoj, kiujn la familio devis pruntepreni de ŝtata banko kaj repagi post kvin jaroj, — afero neebla. La tuta enspezo de la familio, tri personoj, estas nur 3000 levoj monate. Kiam el alilando oni sendis monon al Bulgario por helpi la malriĉajn suferintojn de la tertrema katastrofo, kompreneble, oni pensis, ke la mono estos uzata ĝuste por helpi tiajn homojn supre priskribitajn. Sed neniam ŝtatoficistoj ricevas helpon el la kolektita mono por ripari siajn domojn, ĉar la registaro diras, ke oficistoj estas "riĉaj". Fakte ili estas tiel malriĉaj kiel la proverba preĝeja muso. La helpmono el aliaj landoj estas ĉefe uzata por ripari la ruinigitajn lernejojn, ŝtatoficejojn, policejojn (ĝendarmejojn), ŝoseojn kaj similajn ŝtatajn posedaĵojn, kaj preskaŭ neniom atingas la vere malriĉajn suferintojn. La registaro zorgas pri siaj posedaĵoj unue, due, kaj trie, kaj la privatuloj ricevos, kiom restos, jes kiom! Ni kutimiĝis al tia traktado en lando, kie aferoj estas ofte renverse farataj. Dum la milito niaj soldatoj estis ekipitaj somere per vintraj vestaĵoj, kaj vintre ili ricevis ĉemizojn porsomerajn. Se ŝtatoficistoj, kiel priskribitaj, estas "riĉuloj", ni lasas al vi fari bildon pri la veraj malriĉuloj.

Vaguloj.

BLUA TRANKVILECO

"Maligin"-partopreninto de arkta ekspedicio, ripozante post furioza spirado de glacia ventego, staris en senfina glacidezerto. Glacio fortege kaptis kaj kunpremis la ferajn ŝiprandojn de l' glacirompilo, kvazaŭ mokfierante per sia luma bluo.

En la kvieta nokto mi forlasis la sufokan kajuton kaj supreniĝis ferdekon. Ĉirkaŭ la de glacio katenita dormanta glacirompilo disetendiĝis la trankvileco. Ŝajnis, ke furioza plorbruo de ventego, bolado de glacio, ĉirkaŭe de ĝemanta ŝipo, ventfajfado en ilaro, ĉio estis ne hieraŭ sed pasis delonge, delonge...


Malproksime, kien nur ĝisatingis la okulo, regis glacia dezerto, kvieta kaj mistera, limigita per brilo de oranĝa rondo, brilanta en malproksima ĉielblueco. "Ropoki" kaj "torosi" (nomo de glacipecegoj) superverŝitaj per ĝia lumo, ĵetis sur glacion mallongajn aĵurajn ombrojn.

Proksime, antaŭe de glacirompilo, en granda blua glacitruo naĝis grandioza glacimontego ("Ajsberg"). Ĝi estis preskaŭ kuba. Sunradioj rerompiĝis en ĝia kvarcvitra korpo. La glacimonto brilis kiel majesta luma smeraldo.

Insulo "Nadeĵda", malserena kaj nigra roko, kun neĝa profundaĵo inter blua glacio, ŝajnis vualita.

Mi min apogis ĉe ŝtupartenilo kaj staris ravite per tia beleco de la mirakla lando kaj subite ekvidis blankan urson. Apenaŭ videbla sur neĝo, dank' al sia luma felo, ĝi — reganto de glaciaj maroj, singardeme kaj malrapide rampis sur la glacion. Mi longe scivoleme rigardis kaj subite perdis ĝin el miaj okuloj.

Rapide mi prenis lorneton kaj denove daŭrigis la serĉadon. La urson mi tuj trovis sur ebena glaciplaceto, ĝi distiriĝis laŭ longeco de sia korpo; ĝi kvazaŭ heroo kuŝis ventre kaj ion atente rigardis, malrapide kapturnante. Poste ĝi denove ŝtelrampis, premante la kapon al glacio.



Akvosulko en unu el la vastegaj glaciejoj de l' polusa maro

Kien ĝi ŝtelrampas? Mi komencis serĉi la celon de la urso, kaj trovis: tie estis foko. Kiel nigra buleto ĝi kuŝis sur la glacio kaj dormis. Proksime estis videbla glacitruo por forkuro. Kaptisto alproksimiĝis. Momente ĝi ĉesigis la rampadon, singardeme ĉirkaŭrigardis, iom levis sian kapon kaj poste denove grizbulete glitis laŭlonge de l' glacio. Jam ĝi estas proksima.

Subite malantaŭe io krakegis. Mi ekrigardis, min turnante.

En la profundaĵo de l' insulo malsuprenrampis glacipecegoj. De supro rompe glitiĝis grandega glacipeco, kaj ĝi fale al piedo de l' insulo milpeciĝis ĉe la bordo. La bruo rompis sonĝon de la foko, ĝi levis sian kapon. La urso senmoviĝis, ĝi atendis. La foko ankoraŭ iom movis sin kaj poste ektrankviliĝis.

Tiam la urso denove rampis. Kiel antaŭe — singardeme, apenaŭ ŝovmovante siajn piedegojn, ĝi ŝtelrampis.

Ĝis la foko restis nur unu paŝo. La urso singardeme ekleviĝis, subita forta salto, kaj ĝi ĵetis sin sur la viktimon, kaptis ĝin per siaj pezaj piedegoj.

Mi forturniĝis. En la dormanta blua beleco estis malafable vidi mortbatalon, sangon, lukton pro ekzistado, pro plena stomako. Ĝi malĝentile detruis la belecon de la blua trankvileco. Kvazaŭ dum la melodio eksonis antaŭmorta krio.

Kiam mi denove returnis min al tiu flanko, kie estis prezentita sanga tragedio de malgranda foko, la urso jam forestis. Ĝi foriris tien, al blua malproksimo kaj povas esti, ke ĝi ie denove ŝtelrampas al alia viktimo. Ĉirkaŭe estis nur suno, glacio kaj blua trankvileco, kaj ankaŭ la glacimonto proksime respegulis siajn smeraldajn radiojn...

Mi jam estis preta subskribi la artikoleton, kiam alvenis poŝtisto kaj alportis gazeton, sur kiu mi ekvidis sensacian titolon:

Cappi mortigis Malmgren-on

Sovaĝa besto... Kaj homo, kiu lasis post si miljarojn da civilizeco kaj kulturo... Ili ambaŭ verŝis sangon en la blua trankvileco de l' glacia dezerto.

Nikolao Filipov. En "La Ondo"
trad. A. Erjuhin (9682) Arĥangelsk.

BUĤARA

Skizo de Demetrio Albanov

(Fino)

La ripozanta homamaso malrapide moviĝas ĉirkaŭ la baseno en difinitan direkton; multkolora torento belornamas feste-nigran spegulon de la akvo. Sur la placo estas konstruitaj ĉ a j - ĥ a n a - o j[1]. La indiĝeno tre ŝatas tetrinkadon, tial la ĉaj-ĥana-oj estas plenplenaj. Sur tapiŝoj, per kiuj estas kovritaj grandegaj kaj larĝaj litoj-tabloj, kaŭras rondvicoj da homoj; ili dece, ne-rapide te-trinketas el sola te-taso laŭvice regalante unu la alian; ili mallaŭte kaj malmultvorte parolas, ili sindeteneme ridas, — ili aŭskultas kantistojn aŭ kordludistojn. Ĉiu ĉ a j - ĥ a n a havas sian trion-kvaron da kantistoj aŭ muzikistoj.

Ĉi tie oni kantas laŭ tre malnova maniero: alttone, per nenatura pro la streĉiĝo voĉo. Enhavo de la kantoj kutime estas ia heroa okazintaĵo el la tempoj de militaj sukcesoj dum disfloro de mahometana potenco (XV-a jarcento, epoko de Tamerlan), sed tie kaj alie ankaŭ aŭdiĝas novaj kantoj inspiritaj de la Revolucio.

Tre originala estas indiĝena kordluda muziko kaj la instrumentoj mem. La muzika principo baziĝas je la apliko de fortaj ritmobatoj kaj paŭzoj. La ĉefan melodion kondukas k i j a k — loka parenco de l' violono, ceteraj instrumentoj nur pecigas la melodion je pecoj de difinita longo. Per ioma pliviglig o kaj malrapidigo de la ritmo kaj subita variado de la paŭzoj la kordludistoj atingas celitan efikon, — ili ekscitas, nerimarkite plivigligas la korpulsadon.

Bildo de l' orienta multkoloro, ĉirkaŭvolvita per oro de la luno, incitiĝo inspirita per originala muziko, varmo malfortiginta la memregon, — elvokas emociojn kaj rememorojn pri iam sonĝita fabelo...

Sed — ie apude gorĝoblekas aŭtomobilo; okullevante ni rimarkas, ke la ora lumo fluas ne nur el la ĉiela lanterno, — ankaŭ grandaj elektraj lampoj pendigitaj super la placo fluigas ĝin; ĉe supro de la preĝejo, de kie en difinita tempo alvoke krikantas m u e d - z i n - o[1], estas alĝustigitaj radiaj laŭtparoliloj kaj multsignife rigardas per siaj funeloj sur la placon.

Estas la Novo, kiu kreskas, elmontriĝas el sub la Malnovo, kiel tiuj funeloj de la laŭtparoliloj ĉe l' supro de la preĝejo. Dume ili funkcias kune — la brila inventaĵo de la scienco — radio

[1] Indiĝena tre-trinkejo. Primitiva ejo, ofte nur tegmentita, sed senmura, kie estas starigitaj vicoj de larĝaj lignaj litoj, servantaj samtempe kiel tabloj kaj seĝoj.

[1] Helpanto de m u l l a - o (pastro), kiu invitas je fiksita tempo mahometanojn al la preĝofaro per krikanto de difinitaj preĝoj kaj tekstoj el Korano.

Antisemitismo en USSR

Dum la lasta tempo evidentiĝis kelkaj faktoj de aktiva antisemitismo en USSR. En vitra fabriko apud urbo Bobrujsk (Blankrusio) kelkaj laboristoj insultis, batis kaj diversmaniere turmentis judan laboristinon. La administracio, la fabrika komitato, ankaŭ la kompartia ĉelo malbone atentis la aferon. Nur pro enmiksiĝo de l' superaj sovetaj organizoj la persekutoj kontraŭ la laboristino estis ĉesigataj kaj la kulpuloj arestataj.

En alia fabriko (ankaŭ en Blankrusio) "huliganoj" (fi-diboĉuloj) verŝis varmegan akvon sur judan ĉarpentiston. En Voroneĵ-a universitato okazis ankaŭ io simila. Rezulte de persekutoj fare de kelkaj reakciaj studentoj kaj eĉ profesoroj, sin venenis juda studento Majzel. Ĉiuj ĉi okazoj devas esti konsiderataj kiel sekvoj de kontraŭ-revolucia agitado, uzanta la ankoraŭ grandan malkleron ĉe kelkaj partoj de l' loĝantaro. La subpremitaj kapitalistaj elementoj en sia batalo kontraŭ la kreskanta socialisma mastrumo profitas ĉiujn malnoblajn rimedojn, por detrui la unuecon de l' laborulaj klasoj diversnaciaj. Estas tamen grava diferenco inter la kondiĉoj, en kiuj disvolviĝis la antisemitismo dum la cara reĝimo kaj en nuntempo. Antaŭ la Revolucio la movado kontraŭjuda kaj ĝenerale la movado kontraŭ naciaj malplimultoj estis speciale subtenata de la cara polico kaj oficistaro. Tiu agado, akcelanta la internacian malamon, servis kiel efika rimedo, fortiranta la amasojn de l' revolucia movado. Sed nun la konscia laboristaro kaj la Soveta registaro persekutas ĉiujn provojn disigi la laboristan klason unuecan sendepende de ĝia nacia aparteno.

(127)

---

kaj malnovega travivaĵo, tradicio, signo de la malklero, m u e d z i n - o. Sed jam proksima estas la tempo, kiam ĝi cedos, la Malnovo, kiel cedis la emiro, kiel cedis la citadelo, kiel cedis "Turo de l' Morto" ...

Grupo de viglaj sunbrunigitaj buboj, formetinte vestaĵojn, ĵetiĝas en la basenon. Oraj makuloj de la lumo, penetrintaj sur la nigran glataĵon de l' akvo, trans la foliaro, timigite ektremas kaj diskuras per centoj da globetoj, serpentetoj, steletoj ...

La voĉo de l' kantisto forflugis en iujn neatingeblajn suprojn kaj kvazaŭ malfluidiĝis je la senmovo, nur vibranta ...

B u ĥ a r a , M e z a A z i o , 23./24. 8. 1928.

Nur tiam vi rajtas paroli pri sukceso, kiam el via kurso rezultas aliĝoj por SAT kaj abonoj por "S-ulo".

Historia skizeto el mia eksterordinara vivo

Unua konfeso dum 22 jaroj

Mi naskiĝis en la jaro 1878 en la vilaĝo Ŝeremetjevka de la distrikto Atkarsk en Saratova gubernio. Mi estis duenaskita filo. Nia patro, malriĉa vilaĝa forĝisto, mortis, kiam mi finis la elementan vilaĝan lernejon kaj estis dekdu-jara knabo. Dum mia pli aĝa frato estis dekkvin-jara kaj du fratoj kaj fratino estis pli junaj ol mi. Sekve sesope kun nia patrino ni devis naĝi tra la homviva maro kaj akiri al ni pecojn da pano.

Tre maldolĉan trinkaĵon donacis al ni la sorto: duonnudaj, duonsataj, haladz-malsanaj — ĉar dum brulego nia ligna dometo forbrulis kaj ni loĝis en malseka terkabano — ni devis somere paŝti brutojn de l' vilaĝanoj kaj vintre vagadi tra la proksimaj vilaĝoj kaj almozpeti. Neniu vidis kaj rimarkis, kiel ni suferis. Sed ĉiu klopodis iel ajn otendi kaj ekspluati nin. Legante multe da libroj, mi volis ekkoni la dion kaj lian bonanimecon. Sed vane: ju pli proksimiĝis mi, des pli li forkuradis de mi, kaj finfine tute malaperis. Tial en tre frua juneco mi fariĝis ateisto.

Dekvin-jarulo mi dungiĝis grenmuelejon de bienulo kaj laboris tie ĝis la aĝo de dudek unu jaroj. Tiam oni ordonis al mi iri militservi. Do en mia memoro estis freŝa bildo pri sufera vivmaniero dum la infaneco. Mi demandis min: Kial oni ne zorgis pri mi kaj ne nutris dum la infaneco, sed nun jungas min? Tial mi estis preta ribelulo ...

Oni sendis min por militservi al Varsovio en gvardian S. Petersburgan regimenton. Post unu kaj duona jaro mi estis serĝento kaj komencis porti en la regimenton revolucian literaturon. Ĉar estis la jaro 1903, en Varsovio svarmis revoluciuloj kaj diversnuanca revolucipartia literaturo. Mi povus ekmemori multajn K-dojn kaj citi iliajn nomojn kaj agmanierojn. Sed mi timas, ke mi povus fari al ili ursan helpon[1]. Tamen oni devus memori, ke la tria gvardia divizio diris sian pezan vorton dum la februara revolucio en 1917 en Petrogrado ... Povas esti, ke niaj modestaj revoluciemaj semoj bone ĝermis. Je komenco de l' jaro 1905 mi finis militservon kaj forveturis vagonare hejmen. En mia kofro troviĝis grandega trezoro. Kvindek kilogramoj da revolucia literaturo. Disdonadon kaj publikan legadon mi komisiis al mia pli aĝa frato Bazilo. Sed mi mem komencis energie vojaĝi tra la vilaĝoj kaj organizi armitajn taĉmentojn. Celoj de tiuj taĉmentoj estis — fari revolucion: ataki bienulojn, malarmi iliajn gardistojn-straĵnikojn. Ĉiu bieno tiutempe estis kiel malgranda fortikaĵo kun sia propra garnizono de kvin ĝis ducent bone armitaj militistoj ...

Tre rapide mi sukcesis organizi en multaj lokoj de l' tri distriktoj taĉmentojn po deko ĝis dudekkvino da bravuloj ... Paralele kun la bienoj ni ankaŭ ne indulgis arbargardistejojn kaj ŝtatajn brandvendejojn. La tutan brandon ni disverŝadis teren. Armilojn kaj monon ni forprenadis. Monon ni dividis jenamaniere: 50% fluis en la taĉmentaran kason, 25% en kason de tiu taĉmento, kiu partoprenis la atakon dum mongajno, kaj 25% al ĉiuj anoj, kiuj partoprenis la atakon. Mi devas substreki, ke la mono en la senco de persona riĉiĝo nenian rolon ludis: ĉar la sumoj estis malgrandaj kaj sufiĉis nur por ĉiutagaj kurantaj elspezoj. Atakojn ĉiam ni faris nokte, kaj por pli bone kaŝi postsignojn, mi konsilis al lokaj K-doj troviĝi ekster atakata domo kaj eviti renkontojn kun la geservistaro. Post ĉiu atako mi rapidis vagonare aŭ ĉevale alian lokon, por nepre tuj fari similan atakon kun loka taĉmento. Dum la atakoj oni ne devis verŝi vane sangon. Do, estis severa devizo: pafu, kiam oni pafas. Sed la kuŝantan homon indulgu ...

Dum la atakoj mi estis dufoje vundita, sed ne restis la ŝuldanto: mortigis bienulon Emriĥ, policoficiron Ageev kaj tri spionojn. Kiam ĉiuj taĉmentoj estis bone armitaj kaj havis bonajn gvidantojn, ni decidis, ke ĉiuj taĉmentoj ataku en sia loko ion ajn en ĝuste fiksita tempo. Estis jam fino de 1906. En la urboj la revolucio estis sufokita. Tiam nia guberniestro kun taĉmento de kvarcent kozakoj pro sciigoj de l' spionoj trafis nian dekokpersonan taĉmenton en vilaĝo Kopjoni. Kvankam la kozaka taĉmento tri tagojn serĉis nin en la vilaĝo, tamen neniu estis arestita. Sed oni povis klare rimarki, ke lokaj spionoj vigliĝas: ĉar nia loĝejo estis alian tagon traserĉata aparte kaj tre diligente. Sed oni neniun povis trovi. Ni decidis traŝiri la sieĝantan militist-ĉenon, por ne sidi en kaptilo. Kaj ni foriris la unuan nokton de la sieĝado, ne mortigante eĉ unu kozakon.

Por pruvi al la "sinjoro guberniestro", ke en niaj pulvujoj ankaŭ estas pulvo, mi klopodis kolekti sufiĉan kvanton da taĉmentanoj, por aranĝi al lia moŝto kaj liaj kozakoj konvenan "ŝvitbanejon". Sed ve! ĉi tie klare montriĝis karaktero kaj sklava heredeco de la rusa homo: preskaŭ ĉiuj taĉmentanoj fariĝis nedecidemaj, timemaj malagemuloj. Estis okulvidebla la malapero de iama entuziasmo kaj braveco. Ili rigardis iel suspekte, rakontis pri forteco de l' cara reĝimo, kaj iliaj okuloj kvazaŭ petegis: foriru kaj restigu

---

[1] Iu urso helpis al sia dormanta mastro kontraŭ mordema muŝo per ŝtonego, sed trafante la muŝon ĝi ankaŭ frakasis la kapon de sia mastro.

nin vivi trankvile... Tiam mi sendis leteron al la guberniestro, ke li ne serĉu venton sur la vilaĝa forno, sed serĉu ĝin en la kampo...

Ĉar leĝe mi ne povis vivi, ankaŭ ne mia frato B., tial mi decidis forveturi. Do en septembro 1906 mi diris adiaŭ al mia patrino kaj fratino, kiuj tiutempe servis en la urbo Saratov, la unua vartistino kaj la dua kiel kuiristino. Pli junaj miaj fratoj estis jam mortintaj. Ankaŭ mi diris koran "ĝis la revido" al mia propra nomo: "Aleksandro Iljiĉ Tjurin". Do mi ĉion perdis: patrinon, fratinon, fraton kaj eĉ mian propran nomon ĝis hodiaŭ. Karaj Gek-doj! vi estas eĉ ne kapablaj kompreni mian dudekdu-jaran proletecon, mian animan ĝemdolorecon, ke mi eĉ ne rajtas havi propran nomon, proprajn infanojn. — — —

Post la migrado mi trafis la urbon Baku kaj laboris tutan jaron en grenmuelejo de la Aga Bala Gulief. Poste mi devis forveturi alian urbon, ĉar pro mia korespondado kun patrino kaj fratino la ĝendarmoj trovis miajn postsignojn kaj kun mia fotografaĵo en manoj jam serĉadis min... Do mi formigris kun nova — la tria nomo. Ĉi tian vivmanieron mi rigardis kiel sencelan, sensencan, enuigan kaj naŭzan. Tial mi pensis formigri Amerikon aŭ Persion kaj batali en taĉmentoj de l' tiama persa revoluciulo Saltar Ĥan. Sed lingvaj baroj timigis kaj detenis min... Jen hazarde en burĝa gazeto mi renkontis noton pri esperanto. Mi devas substreki, ke laboristaj gazetoj kaj ĵurnaloj obstine evitadis kaj ne ŝatis ĉi tiun demandon. Post nelonge mi trovis esperantiston kaj ne sciante patrolingvan gramatikon, je mezo de jaro 1909 mi komencis lernadi nian helpilon. Post kvarmonata lernado mi eksentis grandegan ĝojon: antaŭ miaj okuloj malaperis lingvobaroj kaj landlimoj...

Mi havis jam kvin laboristajn lernantojn, sep diverslandajn korespondantojn, abonis kvin esperantajn gazetojn. Mi sendis ĉiumonate unu aŭ du artikolojn al "Internacia Socia Revuo"[1]... Sekve mi trovis celon por la vivo kaj rimedon por agado...

Kvankam mi estis serĝento, kiun oni dum la milito kun granda plezuro pardonus, mi eŭropan hombuĉadon ne partoprenis. Mi agitis kontraŭ la milito, kiun mi rigardis kiel brit-germanan kapitalistan interbataladon, Rusion kaj Aŭstrion kiel malsaĝajn bovinojn, sur kiuj rajdas mastroj kaj forrompos siajn kornojn. — — — P. S.

[1] La antaŭmilita esp. lab. gazeto.

Por la 9-a SAT-Kongreso

Sigelmarkoj: 60 ekz. (1 folio) 0.50 mk. g.
Leterfolioj kun kovertoj: 15 ekz. 0.50 mk. g.
Tuj mendu ĉe: W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 aŭ ĉe Adm. de SAT.

EL LA HISTORIO DE L' SOCIALISMO

12. Edvardo Vajan'[1]

Edvardo Vajan', disĉiplo de Blanki, membro de l' Revolucia Centra Komitato dum la Pariza Komuno, kiun la Versaja kontraŭ-revolucio kondamnis je morto, naskiĝis 28. januaro 1840 kaj mortis 18. decembro 1915. De Blanki, kiun li konis ja amis, du vortojn li volonte citis, la unua estis: "Kiu havas feron, havas panon", kaj la alia: "Ni faras nur homecajn paŝojn". Li rigardis tiujn vortojn kiel antaŭgardajn, la unuan kontraŭ humila rezignado antaŭ la nuntempa socio, la duan, kontraŭ la agitita utopio, kiu transfluas de l' eksplodo al la inerteco.



Ĉi tiu inĝeniero de Artoj kaj Manufakturoj, doktoro pri sciencoj, doktoro pri medicino, kiu, antaŭ ol li enviciĝis aktive en la revolucia junularo, studis ne nur en Francio, sed en la universitatoj de Germanio, dediĉis decide, unu fojon por ĉiam, sian tutan vivon, korpon kaj intelekton, al la Proletaro. Ĉi tiu dediĉo estis farata jam, kiam li en oktobro 1870 partoprenis je la ribela provo kaj aliĝis al la afero de l' Komuno; kiam lin en marto 1871 la 8-a Pariza distrikto sendis kunsidi ĉe la Komuno. Lia dediĉo estis konscie renovigata en 1880, kiam li sekve de amnestio, revenis Francion post jaroj de ekzilo, kiuj estis por li jaroj de studado. En Londono li estis vizitinta la domon de Karl Marks kaj estis tiom influita de la marksista koncepto, ke neniu iam komprenis la risortojn, kiuj movas la mondon, laŭ maniero pli konforma al la historia materialismo. Kiel ĉiuj veraj scienculoj, li senĉese lernis kaj pliriĉigis siajn sciojn por utilo al la proletara klasbatalo.

Oni povis konsulti lin pri ĉiuj temoj demografiaj, politikaj, historiaj. Oni povis esti certa, ke oni havos respondon trafan, precizan kaj kompletan. Sed, vere oni devis insiste instigi lin. Li laŭ sia naturo malmulte komunikis siajn pensojn. Publike paroli estis por Vajan' kvazaŭ ofero. Mediti kaj konkludi estis la du solaj agmetodoj, kiuj konvenis al li.

El ĉio tio, kio malkaŝiĝis en sia korpa aspekto, solida, iom masiva, kun movoj malrapidaj kaj mallongaj, rezultis originala fizionomio. Parolante li havis mienon, kvazaŭ li legus sian penson de malantaŭ siaj okulvitroj. Supraĵa okulo vidis en li la konvencian tipon de l' "germana profesoro". La Pariza amaso, kiu konis lin, liaj fidelaj elektintoj en Ŝaron' kaj Per-Laŝez' (france: Charonne, Père-Lachaise), kiuj trovis lin pretaj ĉiam ilin aŭskulti kaj ilin gvidi, transpasis ĝis la brulanta kaj firma animo de l' homkondukanto. Ĉar, laŭ sia maniero, li sur la amason transportis profundan influon, per sia trankvila kuraĝo. Kiam dum iu kunveno la kontraŭuloj detruis la tegmenton kaj briko falis proksime de li sur la estraron, li surmetis flegme sian altan ĉapelon sur la kapon. Sur tiujn, kiuj povis proksimiĝi al li, li efikis per la persista rigoreco de siaj rezonadoj kaj la komuniko de konvinko nutrita per faktoj.

Organizi, ĉiamaniere, la demokratajn celadojn, ne pro ili mem, sed kiel rimedon de ago fare de la laborista klaso, estis lia tuta celo sume. Li en tio vidis la garantion realigi la unuecon de l' klaso.

Dum la lasta mondmilito li batalis kontraŭ la "germana imperialismo" t. e. ke li subtenis la francan, britan, caran imperialismojn...

[1] France: Edouard Vaillant.

FAKTOJ KAJ KOMENTOJ

Por la venonta mondmilito

En la Pacifika Oceano ĉe Singapur baldaŭ komenciĝos la konstruado de deponejo, provizumejo, arsenalo kaj ĉio necesa por potenca militŝiparo. Grand-Britio disponis por tiu celo 72 milionojn da funtoj sterlingaj por la nuraj ĉemaraj konstruadoj. Estas antaŭvideble, ke post dek jaroj ĉio estos finpreta. Tiam la Usona kaj Britia imperialismoj decidos per milito pri la sorto de l' mondo.

Dume oni konstatas, ke laboristaj gazetoj el diversaj landoj defendas ĉu la politikon de Britio ĉu tiun de Usono. Same okazis en 1914 rilate la imperialismon de "Entente" kaj tiun de Germanio. El tio oni povas konkludi, ke la historio konsistas el ripetiĝo de similaj okazoj. Kaj tio daŭros, ĝis iu imperialismo trudos sian regadon al la tuta mondo, aŭ, prefere, ĝis la Laboristaro unuiĝos mondskale, rifuzos partopreni en tiaj militoj kaj forrenversos la kapitalistan reĝimon, kiu ne povas ne esti imperialisma.

SENNACIULA JUNULARA PAĜO

Sub kontrolo de Junulara Sekcio de SAT. — Redakcia adreso: 14, avenue de Corbéra, Paris XII[e] (Francio).

ĈE NI KAJ ĈE ALIAJ

Skizo pri nia laborkampo

Sufiĉa kvanto da gejunuloj ekzistas en nia organizo. Necesas ligi tiujn K-dojn, pli forte ol ĝis nun, per speciala ligilo, — per aparta paĝo en nia gazeto. Precipe, kiam ni konsideras, kiagrade en nia epoko la patriota sento, la ŝovinismo kapablas utiligi por siaj malnoblaj celoj la purajn, de antaŭjuĝoj liberajn sentojn de junuloj, devus vekiĝi en ĉiu juna SAT-ano, kiu — ni povas supozi — konscias pri la danĝero de tiuj patriotaj organizoj, la forta volo kunlabori aktive en la Junulara Sekcio de SAT. Tute sendepende de tio, ĉu li krome laboras samintence kaj samsence en partiaj, sindikataj aŭ fakorganizaj junular-ligoj. SAT, kiu konsistigas apartan sent- kaj pensmedion, eksternacian, kies rolo estas ĉefe eduka, kleriga, estas speciale antaŭdestinita por servi al la antaŭenema junularo. Nia Sekcio estas bezona; necesas plifortikigi ĝian pozicion per fervora, SAT-inda laboro...

* * *

Libkneĥt (germ.: Liebknecht), kies plorindan morton por la laborista afero ni ĵus rememoras por la deka fojo, estas glora simbolo por la junaj batalantoj. Kiam densa nebulo envolvis la homajn mensojn dum mondmilita epoko, en jaro 1915, li arigis ĉirkaŭ si rondeton da gejunuloj, kunvenis sekrete kun ili en Jena kaj priparolis la proksimajn taskojn kontraŭmilitajn. "La junularo estas la plej pura flamo de l' Revolucio" estas karakterizaj liaj paroloj; li havis la firman konvinkon, ke la impulso de l' junularo prezentas per si mem grandegan forton por la tutlaboristara afero, ofte de decida signifo.

Ĉiuj politikaj Internacioj trovas fortan apogon en siaj junularaj sekcioj. La Amsterdama Junularo (socialista) kunvenas dum tiu ĉi somero en Vieno; kelkaj ĝiaj sekcioj, la sveda, la franca (Pariza regiono), subtenas esp-on. Ni raportos aliloke, kiel ni provos influi ĉe tiu grava internacia kongreso. Pri la Komunista Junular-Internacio ni scias el la oftaj anoncoj en "S-ulo", kiom ĝiaj grupoj kolektive serĉas korespondadon trans la landlimojn, ofte tre sukcesan. Ni scias, ke en la ĉeforgano de Komsomol (la sovetia ligo) oni arde diskutis pri esp-o dum la lasta jaro; verŝajne senrezulte, ĉar la gvidantoj mem ne favoras nian lingvon. La Anarkista Junulara Internacio, laŭnombre tre malforta, oficiale uzas esp-on kaj dissendas siajn cirkulerojn esp-lingve.

La grupoj de la "Turista Asocio La Naturamikoj" en diversaj landoj plejparte rekrutiĝas el gejunuloj. La kampo por varbi ĉe tiu proleta organizo estas sufiĉe favora, kaj ni scias, ke en Germanio ekz. ekzistas granda nombro da naturamikoj-SAT-anoj, kiuj — eble ne sufiĉe ankoraŭ — influis en sia medio por la lernado de esp-o. —

Parolinte pri ili ni transiru al la neŭtrala organizo "Mondjunularo", kiu bazas ĝenerale sur pacifistaj tendencoj, sed en kies tre interesaj kunvenoj kaj "tendaroj" partoprenas gejunuloj el ĉiuj tendencoj (inkluzive proletaraj). Tiu organizo oficiale uzas esp-on, tio signifas: estas plene varbita por esp-o.

Malmultaj vortoj pri niaj ĉefaj kontraŭuloj en esp-ista kampo. Ekzistas unu katolika junular-organizo esp-ista, kiu tre malofte publikigas kelkajn paĝojn en esp. katolika organo; krome aperas sub katolika gvidado "Skolta Heroldo" kaj "Etulo" (ĉi lasta por infanoj). La skolta movado, kiel konate — forte organizita en multaj landoj, internacie bazita, kun internacieca moraro, kulturas en siaj kadroj naciecan, militaristan spiriton; ni scias, ke en Britio oni intense propagandas esp-on al iliaj taĉmentoj. Ni devas kontraŭbatali ilin kiel portantojn de naciista spirito. Ne necesas atentigi pri la junularorganizo de l' faŝistoj en Musolinio mem (vi legu pri tio cetere detalan artikolon en "S-ulo", n-o 209) aŭ aliaj junpatriotaj organizoj, kie niascie esp-o ne trovis iun favor-akcepton.

Pri la neŭtrala esp. junulara organizo TEJA ni diris kelkajn vortojn en n-o 218. Ni havos estonte okazon plion diri pri ĝi.

* * *

Kiel komence dirite, nia laboro konsistas en konscia kulturado de spirito konforma al la SAT-celoj, inter la laborula junularo studanta esp-on. Sed ni ankaŭ devas akiri tiom da organiza forteco, ke ni povu helpi al SAT plenumi specialajn taskojn, kiel la starigon de infan-kolonio, junulara tendaro, junular-hejmoj, interŝanĝo de infanoj k. a., taskoj, kiuj forte rilatas la junularon...

Ne pli hodiaŭ. Ni revenos al niaj taskoj en venontaj artikoloj. N. B.

Legu la junularan literaturon de SAT: "Fabeloj" kaj "Diablidoj"!

Voĉo el Britio

Jarkomenco, la tempo, kiam oni denove decidiĝas, kiam oni reorganizas kaj renovigas, kiam la laboristoj ekzamenas siajn fortojn kaj prepariĝas por nova atako kontraŭ la nuna sistemo. Nu! kio pri SAT-junularo? Ĉu ĝi fine decidiĝos? Ĉu ĝi renovigos, plifortigos sian Sekcion? Jes, certe, ĝi faros. Nuntempe, ia apatio regas inter la lab. esp-ista junularo. Ni, la SAT-Junulara Sekcio devas kontraŭbatali tion. Mankas pli da junaj membroj en SAT, sed ni ne povas akiri ilin, ĝis ni mem vekiĝos kaj komencos utiligi niajn gazetojn, precipe "S-ulo"n. Kion ni, gejunuloj, povas fari tiucele? Trarigardante la SAT-Jarlibron, oni trovas junajn membrojn en multaj landoj. Certe, kelkaj inter ili povas verki ion pri junlaborista vivo en siaj distriktoj kaj regionoj kaj sendi la raporton al la adreso de l' Sekci-gvidanto. Tiam estos eble regule havi interligilon per la Junulara Paĝo. Mi, helpe de miaj ne-esp-istaj K-doj, volonte verkos ion pri la britaj junministoj kaj aliaj junlaboristoj, pri la britaj junlaboristinoj en teksfabrikoj, pri lerneja vivo ktp. Alilandaj Gek-doj, agu sammaniere! Ni elmontru per nia juneca spirito, kiel ni batalas, kiel ni dancas kaj kantas. Ni fariĝu vivanta Junulara Sekcio! Ni sciigu nian opinion pri la vivo, kiel ĝi estas vidata de ni. Tio varbos por ni junajn kunbatalantojn en niajn vicojn. Tiam ni estos forta sennacieca antaŭgvardio de l' tutmonda junularo, moke obstinante al imperialista milito, sed helpante per trafa inform-interŝanĝo al la tutmonda laborista klaso en ĝia batalo. Ni verku por Junulara Paĝo kaj kunlaboru krei fortan Junularan Sekcion. Ankaŭ ni aliĝu kaj veturu, kiu povas, al la Leipziga SAT-Kongreso, por ke nia sekci-kunveno estu la plej impona!

Nur per aktiva laborado ni povos, interplektante niajn manojn super la landlimoj, fari plej bonan servon al la proleta junularo en tutmondo!

W. Latimer (10637).

Neniu SAT-ano, neniu laborista esperantisto povas malhavi la novan broŝuron de K-do **E. Lanti**

La Laborista Esperantismo

40 paĝoj

Prezo: 0.40 mk. g.

—o—

Mendu senprokraste ĉe **Administranto de SAT,** Colmstr. 1, **Leipzig 0 27.** — Francianoj mendu ĉe la sidejo de SAT, 23 rue Boyer, **Paris XX.**

TRA ESPERANTIO

Balaado ĉirkaŭ la propra domo

AL NIAJ SOVETIAJ KAMARADOJ

(Avizo en "S-ulo" 218 k. a.)

Sovetiaj Kamaradoj,
Volu esti sciaj,
Malatento de la mendoj
Kulp' ne estas nia.

Mendoj por ni sen moneroj
Ne valoron havas;
Do en tiu ĉi rilato
Finanzestro pravas.

Se el Moskvo mono venus,
Tio estus bona,
Tiel ja tuj aranĝiĝus
La afero mona.

Ni ekspedus ĉiujn librojn
Kaj gazetajn faskojn,
Niaj komunaj deziroj
Ne havus fiaskojn.

—o—

Riĥardeto plu atendas
La leterportiston . . .
Li alportas ne la monon,
Sed nur mendoliston.

Furioze li ekskribas
Urĝan letereton,
La ora fiŝeto eble
Naĝos en la reton.

Vin forportu la diablo,
Kara SEU-CO-KO!
Via ĝentila perado
estas por ni moko!

Ni ja havas multajn rublojn,
Sed nur sur papero,
Ĉar alvenas per la poŝto
Eĉ ne unu ero!

—o—

Venas la respond' el Moskvo
Kun trankvila tono:
"Ĉiam estas tre regule
Forsendita mono."

Sed por la plirapidigo
Ne per poŝta uzo,
Rusa "sejĉas"[1] estas nia
Plej efika ruzo!

NENIU.

[1] Rusa vorto, kiu signifas "tuj".

LA MULTKOLORAJ, ILUSTRITAJ POŜTKARTOJ DE SAT

estas haveblaj ĉe la Administrejo de SAT, Colmstrasse 1, Leipzig O 27.

Pri pagiloj por SAT-anoj

Rilate la temon en n-o 221 ŝajnas al mi, ke ne estas bezonata novaĵo. Nia Eldonkooperativo eldonis akciojn, laŭ valoro de unu kaj de duona dolaro. Tiuj ĉi akcioj validas kiel kontanta mono en interrilatoj kun la administracio. Kial ili ne valoru en interrilatoj de la SAT-anaro? Tiele ni uzas nian propran monon, fortigas nian organizon kaj ne bezonas malŝpari nian energion. Por la pli malgrandaj sumoj ni ja povas uzi la landajn poŝtmarkojn (? Red.). Estas vojo tuj ekirebla, kaj mi esperas, ke la SAT-anaro uzos ĝin sen ia decido.

Elbano (761).

Baloto pri nova Ĝenerala Konsilantaro

Tria listo de kandidatoj

(vidi n-ojn 216, 221, 224)

K-do Snejko D., Minsk . . 2-a horzono
" Kirjuŝin P., Minsk . 2-a "
" Nikŝich M., Buenos-Aires . . . . . 20-a "
" Sheriff D., London . 0-a "
" Konovalov H., Niĵni-Novgorod . . . . 3-a "
" Kalaŝnikov V., Niĵni-Novgorod . . . . 3-a "

Noto. — **Rajtas esti ano de Ĝenerala Konsilantaro, oficulo aŭ reprezentanto de SAT, nur K-doj jam havantaj du jarojn da aneco kaj ne aliĝantaj iun el la tiel nomataj neŭtralaj organizoj, celantaj la propagandon de esperanto, aŭ al iu ajn asocio, kies celo kontraŭas tiun de SAT.**

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

SOVETIO. Leningrado. 1. okt. 1928 la loka SEU-organizo havis 294 membrojn. Dum okt. dec. aniĝis 63 novaj. La tuta urbo havas ses urbpartojn k ĉiun el ili priservas aparta rajtigita K-do. Nun en la urbo funkcias 41 esp.-rondetoj, kie lernas ĉ. 600 Gek-doj. La gvidantoj de l' urbpartoj organizas laboron inter rondetoj-ĉeloj, observas ilian laboron, kontrolas ĝin. Sub ilia gvidado la rondetoj laŭplane plenumas laboron k faras bonegan propagandon inter gelaboruloj, interligante sian laboron kun div. aliaj rondetoj de laborejo (fabriko aŭ klubo). Estraro de la rondetoĉelo gvidas laboron en ĉelo. Nun oni faras konkurson inter rondetoj — temas, kie estas plej multe da SEU-anoj, pri abonado de l' gazetoj. Baldaŭ oni organizos konkurson — kie estas plej multe da SAT-anoj, da "S-ulo"-abonantoj. En L. estas ĉ. 80 aktivuloj, per kies helpo la organizo havas sukceson. Estas starigita ligo kun esp. organizoj en Pskovo, Arĥangelsko, Murmansko, Ĉerepoveco. Al ili ni sendas div. materialon, kiu por ili estas necesa. Estas organizitaj esp.-sekcioj en VOKS (Asocio de kultur-ligo kun alilandoj). Reprez. de l' organizo eĉ partoprenis 8. SAT-Kongreson. Ankaŭ bone funkcias sekcio en junularorganizo de unu urbparto. Suprenotitaj 41 rondetoj funkcias jene: 4 — en lernejoj, 4 — en Ruĝa Armeo, 12 — en lab. kluboj, 2 — en oficejoj, 10 — en fabrikoj. Por plibonigi kvalifikon de l' gvidantoj ekzistas speciala seminario. Ekzamen-komisiono kontrolas la gvidanton antaŭ ol sendi lin gvidi rondeton. Gvidantoj mem kontrolas rondetojn unu de alia. Tio helpas al ni plibonigi niajn instru-metodojn. Januare verŝajne ekfunkcios radio-kurso. Notinda estas laboro en nia grandega "Domo de Kulturo" (Viborga urbparto). Tie estas organizita speciala esp. sekcio, kiu havas propran ĉambron. Tie estas faritaj: Rap. pri SAT-kongreso, du "Vesperoj de leteroj el aliaj landoj"; la sekcio kune laboras kun div. aliaj organizoj de l' domo. Baldaŭ tie oni disaŭdigos radie pri kaj per esp-o. Ankaŭ en la ĉambro funkcias esp. ekspozicio. Ĝi faras grandan propagandon. Dimanĉe vizitas ĝin ne malpli ol 150, en labortagoj ne malpli ol 70 homoj. Estas ankoraŭ 6 aliaj negrandaj ekspozicioj. Ĉiuvendrede k sabate la Radiostacio disaŭdigas esp-e. 9. nov. estis plenumita speciala radio-spektaklo "11 jaroj de oktobro". Dum jubilea manifestacio el radioaŭtomobilo oni disaŭdigis salutojn en esp. lingvo. Kaj nun la radio-stacio atendas leterojn (sen poŝt-markoj) de alilandaj labkoroj por disaŭdigi ilin al nia lab-istaro en rusa lingvo. Estas starigita firma interligo kun alilandaj lab-koroj. Tradukoj estas uzitaj en mur- k presgazetoj. P. Tilin. — **Niĵnij-Novgorod.** 23. 12. okazis ĝenerala kunveno de SAT-anaro. Oni solvis la demandojn pri elekto de peranto k vicperanto, propono de kandidatoj por Ĝen. Konsilantaro de SAT, pri abonigo al "S-ulo", pri intern. lab. koresp. Estis elektata unuanime kiel gvidantaro de SAT-rondo: Peranto K-do Konovalov (641), li havas taskon respondi informpetojn k gvidi la laboron, Unua Vicperanto K-do Kalaŝnikov (1125), li havas taskon zorgi pri kolekto de kotizoj k abonoj por SAT estante samtempe kasisto de Gub. Kom. SEU k Dua Vicperanto por Sormovo K-do Golovkin (10 068), li havas ankaŭ taskon doni informojn. SAT-rondo decidis proponi por Ĝen. Konsilantaro kandidatojn de 3-a horzono K-don Konovalov (641) k K-don Kalaŝnikov (1125), ambaŭ el Niĵnij-N. La kunveno unuanime akceptis decidon: "Ĉiu aktiva SAT-ano nepre abonu "S-ulo"-n; por efektivigi tion, oni proponis sendi al ĉiuj alvokon pri neceso aboni, propagandi pere de Biblioteko Esp-a proponante ĉiam legi "S-ulo"-n, uzi la gaz. dum esp. kursoj por pliperfektigo ĉe Gubkom SEU, propagandi pri abono perbuŝe, fari liston de SAT-anoj ne abonantaj "S-ulo"-n k elpendigi ĝin en ejo de Gub. Kom. SEU, por ke ĉiu, kiu ĝin legos, instigu notitajn en listo pri abono. Oni decidis komenci pli vastan utiligon de SAT-aparato por intern. lab. koresp., por ke ĉiu aktiva SAT-ano prenu sur sin taskon pli energie labori en tiu medio; dum sekvonta kunveno pli detale ankoraŭ pridiskuti tiun demandon, ankaŭ meti en la tagordon pritrakton pri projekto de SAT-programo. Oni decidis alvoki ĉiujn aktivajn SAT-anojn laŭpove helpi al IX-a SAT-Kongreso en Leipzig. Necesas noti fakton, ke Legejo de Niĵnij-Novg. Gub. Centra Biblioteko je nomo de Lenin abonis de 1. 1. 29 por unu jaro "S-ulo"-n, k jam kvaran jaron, abonas ruslingvan organon de CK SEU. K-doj, imitu tion, penu abonigi al esp. gazetoj viaurbajn bibliotekojn.

V. Kalaŝnikov (1125).

ĈE LA NEŬTRALULOJ

La grava Esp-Biblioteko, amasigita dum longa periodo da jaroj de Generalo Sébert, en la Centran Oficejon de Rue de Clichy, en Parizo, estas translokita, kiel aparta fako en la grandan Bibliotekon de la Pariza Komerca Ĉambro, 27, Avenue Friedland, Paris VIII. Jen ciferoj, kiuj montras la gravecon de la tuta kolekto de 3000 volumoj aŭ broŝuroj, reordigitaj laŭ jenaj fakoj: A: Oficiala Gazeto; Oficiala Dokumentaro, k div. publikaĵoj de C. O. (55 volumoj); B: Jarlibroj (70 vol.); C: Ofic. raportoj pri la Univers. Kongresoj de Esp. k Kongreslibroj (85 vol.); D: Lernolibroj (335 vol.); E: Vortaroj (140 vol.); F: Propagandaj broŝuroj (600); G: Sociaj sciencoj, filozofio, juro, religioj, ktp. (300 vol.); H: Sciencoj puraj k aplikataj (220 vol.); I: Komerco, turismo, intern. foiroj (320 vol.); J: Literaturo (600 verkoj); K: Gazetoj (240 vol.), plus 40 000 eltranĉoj de neesp-aj gazetoj. — Tiu materialo estas je la dispono de la esp-istaro.

ICK de Esp. Movado aranĝos de 30. 3. ĝis 2. 4. 1929 en Frankfurt a. M. internacian konferencon por turismo k reklamo. Paroladoj k raportoj en la konferenco estas allasataj en ĉiuj naciaj lingvoj k esp-o. Tradukado okazos nur en esp-o.

De 27. ĝis 30. dec. okazis en Grenoble (Francio) la 2-a kongreso de universitataj esp-istoj en Francio, kiu havis ĉefe propagandan signifon k estis tre atentata de la loka gazetaro.

Internacia Radio-Asocio esp-ista perdis sian ĝisnunan sekretarion, kiu estas anstataŭata de: Poul Lendorff, Overbyes Allé 38, Kopenhago.

De la 3. ĝis 9. novembro 1928 okazis en Sevilla la 7-a hispana esp. kongreso, kiu laŭ raporto en "Hisp. Esperanto" brile k sukcese pasis. Partoprenis ĝin kelkaj alilandanoj, inter ili s-ro Cart, la prezidanto de l' Akademio, kiu entuziasme laŭdis la lingvan fluecon ĉe la kongresaj debatoj. Post esp-a diservo (neevitebla ĉe tiaj kongresoj!) la kongresa malfermo okazis kun granda pompo sub prezido de l' reĝido, kiu direktis kelkajn favorajn vortojn al la Kongreso k transdonis ordenon. Same parolis la urbestro k la generalestro de l' regiono. La debatoj turniĝis ĉefe ĉirkaŭ jenaj demandoj: gazeto, vortaroj, propagando. La proksima kongreso okazos en Oviedo, ĉefurbo de Asturias.

Ĉe la katolikoj

"Espero Katolika", la vigla organo de l' katolikaj esp-istoj, aperas de nun dufoje monate. Ĉiu kajero ampleksas 16 paĝojn krom kovrilo.

Oni plendas!

Sekvantaj dudek-du K-doj, al kiuj mi skribis laŭ anoncoj en "S-ulo" k kiuj promesis tujan, certan aŭ garantiitan respondon, ne respondis al mi. Komencanto per tia agado povas perdi la kredon je la utilo de esp-o. Jen la nomoj de l' "silentuloj": 1. Held, A., Dortmund; 2. Schifferth, R., Stuttgart; 3. Noack, P., Weesenstein; 4. Gerold, M., Leipzig; 5. Ahner, O., Thalheim; 6. Harold, Glynn, Townsville[1]; 7. Shanahan, Cl., Melbourne[1]; 8. Steinhofer, F., Hirschbg.; 9. Legry, G., Florent; 10. M. Quemin, Meyzieu[2]; 11. Farres, J., Barcel.; 12. Vicente, J., Lisboa; 13. Lecarme, R., Comblain; 14. Gorgeviĉ, Ĉ., Prilep; 15. Kaszti, E., Pies; 16. Csutak, Fr., Pratevu; 17. S. Dimitrov, Sofia; 18. Aŝerof, M., Plovdiv[3]; 19. Valaviĉarov, I., Samokov; 20. Sjetstrom, I., Karlsborg; 21. Hägg, G., Nynäsnamn; 22. Abrahamson, H., Sandviken.

N. Gejnov (9487), Ural-Sverdlovsk.

[1] La plendanto forgesas la distancon inter Aŭstralio k Sverdlovsk! [2] Vidu noton de tiu K-do en n-o 223 (sub "Koresp."). [3] Eble oni ne liveris al la bulg. K-doj sovetian let. (Red.)



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Balkana Laboristo, monata gazeto de la esp-istoj lab. en Bulgario. N-o 1. Jan. 1929. Adr. Simeon Petrov, ul. "Ŝar Planina" 56, Sofia. Abonpr.: 2 sv. fk. jare. Jen nova lab. esp. gazeto en lando, kie pro la speciale malfavoraj cirkonstancoj ĝis nun ne povis funkcii LEA-organizo. Laŭ la enkonduka artikolo la ĉefa celo de l' gazeto estas la disvastigo de la intern. helplingvo esp-o inter laboristaj rondoj. Sed kiel la K-doj de l' redakta komitato imagas, ke oni povas varbi k disvastigi ĉe personoj, kiuj ne scipovas esp-on, per gazeto redaktata ĉefe esp-lingve? En sia nuna formo la gazeto maltrafas certe la rondojn celatajn, ĉar eĉ propagandaj artikoloj estas verkitaj en esp-o. Se la eldonantoj volas limigi la cirkuladon de l' gaz. nur ĉe tiuj, kiuj ellernis la lingvon, ili ne havos la atendatajn rezultojn por la movado k samtempe por la gazeto, kiuj respondus al la energi-elspezo. N. B.

Laborista Esperantisto, Organo de la Nederl. Federacio de Lab. Esp-istoj, Red.-adr.: Middenweg 226, Amsterdam-O. (Holando). Jarabono: f 0,75. N-o 2, jan. 1929. Oni povas diri samajn vortojn pri tiu gazeto, kiel pri la supra, ĉar ĝi estas preskaŭ ekskluzive redaktata en esp-o. Ĝi sekve povas havi nur malfortan propagandan efikon ĉe novuloj. Tamen, en Nederlando ekzistas jam LEA depost 17 jaroj, kiu en nuna momento apogas sin sur 220 membroj k entreprenas rekonduki en siajn vicojn multajn malnovajn lab. esp-istojn neorganizitajn, kiuj troviĝas en Nederlando. Oni povas nur subteni tiujn energiajn klopodojn reorganizajn de l' nova estraro k deziri plenan sukceson, por ke la lab. esp. movado en tiu lando akiru almenaŭ same fortan aŭ eĉ pli atentindan pozicion ol havas la neŭtraluloj k katolikoj (la lastaj havas en Nederl. sian plej fortan pozicion). N. B.

Korekto

M. Ŝidlovskaja, la tradukintino de "La Kapitanfilino" (A. S. Puŝkin), protestas kontraŭ la aserto en mia recenzo en n-o 220, ke ŝi aldonis en la fino de la verko "suplementon", kies lasta frazo estas kontraŭrevolucia. Fakte mi eraris, ĉar tiu suplemento, aŭtentikaj vortoj de Puŝkin, troviĝas en preskaŭ ĉiuj ruslingvaj Puŝkin-eldonoj, kion mi ne povis scii. La tradukintino sekve nenion el si mem aldonis. Tamen la elstarigo de tiu frazo, per tio ke oni metis la suplementon en la librofinon, ŝajnas al mi montri, ke la antaŭrevoluciaj eldonistoj per tio deziris plaĉi al la caroj. Jief.

* * *

Kontraŭ nia volo en pĝ. 122 (artikolo pri Libkneht-Luksemburg) oni elstarigis kelkajn frazojn per grasegaj litertipoj. Nia deziro estis, ke ili aperu kursiv litere, sed ne en tiu eksterordinare distinga formo. — Red.

Grava alvoko

En Antverpeno troviĝas granda marista hejmo. Kelkaj SAT-anoj decidis varbi la maristaron por nia ideo. Multe vojaĝante la maristoj estos utilaj propagandistoj por esp-o. Por ke nia entrepeno sukcesu, ni petas helpon de ĉiuj landoj. Ni bezonas por la komenco almenaŭ 5 ŝlosilojn el ĉiuj naciaj lingvoj kaj speciale propagandilojn k ĵurnalojn, en kiuj aperis artikoloj pri esp-o. Se jam troviĝas ie esp. maristaj grupoj, ni petas de ili detalajn informojn pri iliaj metodoj de laboro. Por ne esti superŝutataj, ni petas sendi la propagandaĵojn nur pere de ĉefa centro en iu lando aŭ pere de unu grupo. La valoron de l' sendotaĵoj ni rekompencos tuj post ricevo. Notu la prezojn en dolara monvaloro. Esperebla la K-doj komprenas la gravecon de nia klopodo k sendos al Adr.: Grupo de Esperantistaj Maristoj, 20 Ankerrui, Antverpeno, Belgio. (1753)

Rondeto el 12 gepioniroj

K-do Karamnov, Anatolij
K-dino Sagatelova, Ruzanna
„ Kajŝauri, Nadja
„ Levĉenko, Ola
„ Sogomonova, Nora
„ Spiriadis, Elena
„ Kirilova, Nataŝa
K-do Kunĝulov, Alexandro
„ Gladkov, Vladimir
„ Ŝaĥparonjan, Jura
„ Bregman, Samuil
„ Aĥverdov, Ĵora

deziras korespondadi pri la vivo de infanoj alilandaj kaj interŝanĝi infangazetojn. — Sendu leterojn: Sovetio, Tiflis, Zaknarkomtorg. Al K-do Mikirtumov por pioniroj.

MEMORE PRI LENIN

Vjatka Satanaro aranĝas en fino de januaro Internacian Vesperon. Pro tio ĉiuj klasrevoluc. organizoj k individuoj estas petataj sendi poŝtk., leterojn k propagand-materialon. Ĉiuj ricevos respondon.

Adreso: U. S. S. R., **Vjatka,** Domo de Komunistiĉeskogo Prosveŝĉenja.

ATENTU GEKAMARADOJ ĈIULANDOJ!

Esp.-rondeto de P. T. T.-istoj aranĝos sian unuan

Esp. Ekspozicion

por propagandi esp-on inter gelaboristoj. Ĉiuj Gek-doj k administrejoj de esp. gazetoj estas petataj sendi espaĵojn. Helpu nin en nia laboro! Sendu multnombre! Dankplena respondo per PI garantiata.

—o—

Sendu tuj al K-dino Mario Mitrofanova, Poŝtoficejo **Kozlov tamb** (Sovetio).

Gejunuloj!

Por mondvojaĝo piedire mi serĉas junan, malriĉan, kuraĝan K-don kun intereso pri la mondo. Skribu, laŭeble kun fotografaĵo al H. Menner, Kärntnerstr. 26, **Knittelfeld,** Steiermark (Aŭstrio).

MEMORNOTO

Priesper. artikolojn k notojn enhavis:

Daily Herald, Lond., 4. 1.; Le Petit Dauphinois, Grenoble, 27., 28., 29. 12.; Le Dépêche, Grenoble, 22., 24., 26., 27., 28., 30. 12.; Signalen, Stokh., 3. 1.; Labour Woman, Lond., jan. (rubriko); Monde, Paris, 5. 1. (Let. de H. Barbüs al Niŝni-Novgorodaj esp-istoj. Viđu n-o 219 "S-ulo".

Peresper. materialon enpresis:

Travail, Lyon, 5. 1.

* * *

La 2-a Kongreso de Anarkista Junulara Internacio okazos 19./20. 5. 1929 en Brieselang apud Berlin. Sciigojn pri partopreno oni sendu al K-do Willi Boretti, Gemeinschaftsstrasse 30, Berlin-Adlershof. Per sia informbulteno tiu Internacio denove instigas siajn anojn lerni esp-on.

NIA POŜTO

3375. — Tiajn alvokojn ni ne povas enmeti senpage. Ni povus enmeti interŝanĝan anoncon.

1125. — La teksto de l' letero de H. B. taŭgas por propag. organoj, sed ne por "S-ulo". Komparu "Memornoto" en ĉi tiu n-ro.

164. — Pri la uzado de l' prepozicio PO respondis tre detale al vi Fakulo en n-oj 133, 134, 135 de "S-ulo". En la aluditaj de vi ekzemploj ni traktis tiun vorteton tute laŭ la konsiloj de Fakulo.

6600. — La red. de "La N. E." ne sendis al ni sciigon pri la sorto de via artikolo. Sekve de ni ne atendu tiurilatan respondon.

Tofo. — La manuskripto estas sendita al K-do Rublov. Sed, neatendite k neantaŭvidite, okazis ia prokrasto en la transsendo al Odeso.

1225. — Ne estas eble, utiligi en "S-ulo" vian artikolon pri P. Sed ni eltiros parton por "La Lern.".

2798 (Praca). — Se vi deziras, ke ni kalkulu la akcion tiam necesas resendi ĝin.

Povov (Mitiŝĉi). — Mankis la teksto de via anonco.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

— Dankon al ĉiuj Gek-doj, kiuj dez. koresp. kun mi. Bedaŭrinde al ĉ. skribi ne eblas, ĉar tro da koresp-aĵoj alvenis. — J. Pfisterer, Wiener-Neusadt.

BULGARIO

K-do Georgi Ivanov, rabotilnica Lokum "Roza", Gorna Ĝumajo, dez. koresp. kĉl., interŝ. belegajn vidaĵkartojn.

ĈEĤOSLOVAKIO

Filatelistoj atentu! — K-do Franz Kratzer, Neustadt an der Tafelfichte, Flurengasse, 643, dez. interŝ. PM. kĉl.

GERMANIO

Adresŝanĝo. — K-do Gustav Hindorf, Hartwig-Hesse-Str. 29/3, I., Hamburg 5 (stratŝ.)

K-do Otto Lübkert (13 060), Schützenstr. 41, Bad Oldesloe, dez. koresp. kĉl., L, PI. Resp. garantiata.

K-do Otto Hellmut, Tannenweg 26, Berlin-Spandau, dez. interŝ. PI, kĉl.

K-do Fritz Schwarzig, Obere Burgstr. 1, Pirna a. E., dez. koresp. pri arthistorio, literaturo k socialpolitiko kĉl.

K-do Rudolf Brand, Lichtensteiner Str. 23, Glauchau i. Sa., interŝ. PI, bfl., naciaj gaz. kĉl. Resp. garantiata.

K-do Kurt Lange, Baunakstr. 2, Leipzig-N. 24, dez. koresp., pref. kun Svedio.

K-do E. Sämann (13 371), Tailfingen i. Wttbg., dez. interŝ. PI, bfl., kĉl.

K-do Karl Mohrlok, Wiesenstr. 23, Tailfingen i. Wttbg., dez. interŝ. PI, bfl. kĉl.

— Koresp-adon kun ruĝarmeano dez. germ. ruĝ-frontbatalanto. Peras K-do H. Hubertz, Ernststr. 37-a, Essen.

— 20 junaj gelab-istoj dez. koresp. individue pri ĉ. temoj kĉl. Adr.: K-do Otto Röder, Hallische Str. 287, Leipzig-N. 22.

— Atentu! — Grupo de 15 viglaj gelernantoj dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl. Resp. gar. Skribu tuj al: K-do Hubert Ackermann, Dechenstr. 13, Merkstein b. Aachen.

K-do Kurt Zschuckelt, Lange Str. 14, Riesa-Weida i. Sa., dez. koresp. kĉl. L, PI. Resp. garantiata.

HISPANIO

K-do Eŭgenio Ĝil, San Lorenzo, 40, pral. Zaragoza, dez. koresp. kĉl. pri konstruado de junkaj mebloj k korboj. Certe resp.

NORVEGIO

K-do A. B. Ostensen, Bernh. Getz gt. 6, Trondhjem, dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl., L, PI. PM.

SOVETIO

K-do G. Taratorin (24 j.), Nerĉinskij-Zavod, Sretensk. Okr. DVK, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do Gregoro Ĉernov, (19 j.), Poŝt-telegrafa kontoro, Bogotol, Aĉinsk. okr., Siberio, koresp. pri div. temoj kĉl.

K-dino Dina Osina (17 j.), Sovetskaja ul. 47, Bogotol, Aĉinsk. okr., Siberio, koresp. pri div. temoj kĉl.

K-dino Berta Svajger, Novosenskaja, 14, kv. 3, Moskvo-4, dez. koresp. kun medicinlaborantoj el ĉl.

Tutmonda Proletaro!

30 Esperantistoj deziras korespondadi kun la tutmonda proletaro — gejunularo, fabrikoj, sindikatoj k partiaj junularoj, ruĝhelpĉeloj, pri militdanĝero, kontraŭ-bolŝevika bloko, la defendo de l' unua laborista ŝtato ktp. Skribu nur kolektive! Respondo garant.!

Adr.: **Moskva,** Marosejka ul. Petroverigijskij p. 10.
Esp. grupo de Kom. Unio. NMZ. "Klubo"

K-do Petio Kaĉkaĉŝvili, ul. Vorovskogo, 29, kv. 12, Moskvo, dez. koresp. kĉl. Nepre resp.

K-do Boriso Vdovenko, Poŝte restante, Moskvo-64, Kurskij vokzal, dez. koresp. kĉl. Certe resp.

K-do Boriso Nemiskij (terkulturisto), Oktobra, 48, Omsk, dez. serioze koresp. pri div. temoj kĉl. Resp. garantiata.

K-do N. Mal, ul. Engelsa, 4, kv. 1, Moskvo-5, dez. koresp. pri ĉ. temoj, prec. pri teatro k kino. Resp. garantiata.

K-do Feodoro Kretiŝĉenko, Novoslobodskaja ul. 36, kv. 11, Moskvo-55, dez. koresp. kĉl.

K-do N. Novikov, Mjasnickaja, 21, kv. 94, Moskvo, dez. koresp. pri ĉ. temoj, prec. pri kooper. movado.

K-do Nikolao Anisimov (juristo), Socialistiĉeska, 25, Ĉerepovec, dez. koresp. kĉl. PI, PM.

K-dino Lida Ĉeĥneva, 2 Buĥvostova ul. 10/15, kv. 5, Moskvo, dez. koresp. pri ĉ. temoj. Certe resp.

K-do D. Skorin, ul. 2 Sokolniĉeskaja, 23, kv. 11, Moskvo-14, dez. koresp. pri fotado, politiko k a temoj.

— 4 K-doj dez. koresp. kun junkomunistoj el ĉl. Adr.: K-do Visokoostravskij, Sovetskaja, 27, St. Perovo, M.-Kaz. ĵ. d. Resp. garantiata.

— **Gėrmanlingvanoj!** — Kiu volas koresp. kun mi pri studado de germ. lingvo? Mi bone scipovas esp. Adr.: K-do Viktoro Fallin-Stroganov, Provorskaja, 8-a, Smolensk.

K-do G. Miĥajlov, P. O. Azeevo, Sasov, uezd. Rjazan. gub., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

USONO

K-do P. Epifanovich, Box, 47, Internat. House, 500, Riverside Drive, New York, City, dez. koresp. kĉl. k ricevi il. gaz.

ĈU MI TROVOS EN SOVETIO

seriozan K-don, kiu kompletigus mian kolekton de Sov. PM per nedif. maloftaĵoj (prec. el la j. 1923—1926)? Mi donos aŭ PM aŭ abonos (aĉetos) ion ajn laŭ deziro.

K-do F. Ŝilha, **Luze-Koŝumberk,** 75 (Ĉeĥosl.).

ANTAŬ-KONGRESO EN REGENSBURG

La grupo Regensburg invitas la vojaĝantojn al la SAT-Kongreso en Leipzig al Antaŭ-Kongreso en Regensburg. Ni volas per tiu ĉi kongreso montri al la kongresanoj la vidindaĵojn de la urbo kaj de la regiono apud la Danubo kaj utiligi ilian ĉeeston por efike manifesti por esp-o. Tial venu! Vi estos kamarade akceptataj en nia gastama rondo. Anoncu vin ĉe K-do Johano Alzinger, Hauptstr. 16/2, **Regensburg-Stadtamhof** (Germ.). La Gek-doj estas petataj anoncante sin tre klare skribi sian adreson. Ili ricevos senkostajn loĝejojn.

ENHAVO:

	paĝo
Novan paŝon antaŭen	137
Bazaj principoj de l' marksismo	138
La cerbo de Lenin	139
La negra problemo en Ameriko	139
Kamparlaborista mizero en Bavario	140
La nuntempa tajlor-metio en Anglio	140
Diversaĵoj	141
Pri la situacio de rusaj virinoj en Hungario	141
Hodiaŭ en Bulgario	141
Blua trankvileco	142
Buĥara (Fino)	142
Antisemitismo en USSR	143
Historia skizeto el mia eksterordinara vivo	143—44
Faktoj kaj komentoj	144
Sennaciula Junulara Paĝo	145
Tra Esperantio, Recenzejo, Korespondado, Anoncoj	146—48

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)